

Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

ԹՈՒՆԱՅԵԼԻ
ՉԵՐՅԵՆԻՔՍԱՋԵՄԱ

Ĉi-numere legu pri:

**RAPORTO PRI LA 10-a KONGRESO
OKAZINTA EN KOPRIVNICA**

**SINTENO DE KROĀTAJ ESPERANTISTOJ
PRI NEŬTRALA EŬROPA LINGVO**

**SEN JUNULOJ ESPERANTO
NE POVAS HAVI ESTONTECON**

**BRAZILAJ GEEDZOJ MENEGASSO
PRELEGIS EN KROATIO**

1

2012

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Neregula

Konto de UZE:

2340009-1110321529
(Privredna banka, Zagreb)

UEA-kodo:

uzes-y

RESUMO

La jaro 2011 estis tre sukcesa por nia gazeto. Dum tiu jaro ni sukcesis eldoni eĉ 6 numerojn de "Zagreba Esperantisto", sed tiun fakton ni povas danki nur al la financa subteno de la kroata Ministerio pri kulturo. Bedaŭrinde, la jaro 2012 estis tute alia, kaj antaŭ vi troviĝas la sola eldonita numero, iaspeca almanako. Ĝi resumas la eventojn en 2012, sed samtempe ĝi estas la jubilea 20-a numero 20 de nia gazeto. Ni fieras pro tio, ĉar multaj antaŭvidis por ĝi morton en frua aĝo. Ni fieras ankaŭ ĉar ĝi estas gazeto malfermita al ĉiuj siaj legantoj, kaj al ĉiuj esperantistoj, sen cenzuraj klopodoj.

Malgraŭ la krizo kiu skuas la tutan terglobon, en nia landa movado ni povas konstati samtempe la enviindajn rezultojn kaj la malenviindan malkonkordon kiu tro longe daŭras.

Sur la paĝoj de ĉi tiu numero vi trovos grandan raporton pri la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj, kiun ni konsideras la centra evento de nia ĉi-jara laboro.

La numero 20 iasence estas "la numero de Križevci", kion vi konstatos per pluraj artikoloj verkita de esperantistoj el Križevci kaj pri la tieaj eventoj. Sed, ne postrestas ankaŭ aliaj urboj. Konsekvence al la resumeco, ni klopodis unuloke prezenti la laboron en unuopaj urboj.

Jam komence, ni planis turni nian atenton al individuoj, al unuopaj personoj kaj iliaj atingoj. Verŝajne ĉi-tiu numero konfirmas tian redaktan politikon ĉiasence, ĉar ni prezentas al vi aron da interesaj homoj: la junan scienciston Krunoslav Puškar kaj lian sciencon esploron pri esperantistoj, la izolitan esperantiston, foto-amatoron Ivica Šćepanović, la junan poetinon Mihaela Cik, la artiste kapablegan pentriston Song Ho el Koreio ktp.

La jaro 2012 estis proklamita "La Jaro de Tibor Sekelj", kaj do ni notas iom el la bunto da eventoj pri tiu temo.

Neniu kapablus hodiaŭ aŭguri la estontecon de nia gazeto, sed ankaŭ ne de Kroata Esperanto-Ligo. Akceptiĝis tre grava decido: Kroatio kandidatiĝos por organizanto de nova Universala Kongreso en Zagreb post la jaro 2015. Ĉu reala decido, ĉu pozitive respondota de UEA? KEL perdis la solan profesiulon pro monmanko. KEL troviĝas en pozicio de monŝuldanto por longa periodo.

Sed, ni ne perdu la esperon! Ĉiu el ni fosu nian sulkon, la saman kiun esperantistoj de la tuta mondo fosis obstine dum multaj jaroj, kaj venigis Esperanton ĝis ĝia 125-a jubileo.

IMPRESOJ EL KOPRIVNICA

 Redakcia kompilo laŭ la Kongresa raporto de la Organiza komitato

LA PREPAROJ

Jam post la fino de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj okazinta en Bjelovar, naskiĝis inter ĝiaj organizintoj la ideo, ke ankaŭ la jubilea 10-a kongreso okazu en la nordokcidenta parto de Kroatio, ĉar estis evidente, ke el aliaj landopartoj tia invito ne venos. En la unuaj interparoloj de la organizantoj de la bjelovara kongreso oni akcentis, ke estas necese daŭrigi la sukcesan vicon da kongresoj, por organizi tiun aranĝon kiel internacie deziratan kunvenejon de esperantistoj, kaj por konsolidigi la esperantistajn fortojn en la regiono de la urboj Bjelovar, Đurđevac, Koprivnica kaj Križevci. En tiu regiono per fondo de Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac (2010), Bjelovara Esperantista Societo (2011) kaj Esperanto-societo "Estonteco" en Križevci (2012), aperis konsiderinda koncentriĝo de esperantistoj, kiuj deziras kunlabori kaj intensivigi la laboron por Esperanto.

Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Đurđevac sendis sian intencleron al **Zvonimir Mršić**, la tiama urbestro de Urbo Koprivnica jam la 31-an de majo 2011, kaj la subtenon por la kandidatiĝo donis la estrino de Fako pri sociaj aktivecoj de Urbo Koprivnica **Ankica Njezić** la 28-an de junio 2011. La Departemento Koprivnica-Križevci ankaŭ pozitive reagis per respondo de la anstataŭanto de la departementestro, s-ro **Ivan Pal**, la 13-an de junio 2011.

Kandidatiĝletero al Kroata Esperanto-Ligo (KEL), subskribita de la prezidanto de DEC **Zdravko Seleš**, estis sendita la 1-an de aŭgusto 2011, kaj en ĝi troviĝis

7 kondiĉoj sub kiuj DEC povas organizi la kongreson:

1) ke la akcepton de la kandidatiĝo KEL faru ĝis la 1-a de septembro 2011, por ke DEC povu ĝustatempe sendi monpetojn al koncernaj instancoj,

2) ke KEL cedu al DEC la rajton memstare elekti la Organizan komitaton, kaj ke KEL en la Organiza komitato havu nur la rolon de observanto kaj konsilanto,

3) ke ĉiuj financaj aferoj okazu tra la ĝirkonto de DEC, kaj ke KEL siaflanke helpu laŭ eblecoj (organizaj, financaj, programaj kaj informaj),

4) ke KEL rajtigu la LKK-on memstare organizi la kongresan programon, elekti la daton por okazigo de la kongreso, kaj ke KEL siaflanke proponu programojn kaj konsilu la Organizan komitaton se necese,

5) ke DEC konstante informu la Estraron de KEL pri la kongresaj preparoj kaj eventualaj problemoj en la organizado, por trovi komune akcepteblan solvon,

6) ke la kongresaj aliĝiloj estu sendataj rekte al la adreso de DEC,

7) ke KEL planu sian jarkunvenon en Koprivnica, por pligrandigi nombron de kongresanoj.

DEC aparte akcentis: "Se KEL ne povos akcepti la proponitajn kondiĉojn, aŭ se ĝi ne respondos pozitive antaŭ la 1-a de septembro 2011, DEC devos rezigni pri la organizado de la 10-a kongreso en Koprivnica."

Kiel antaŭvidite, konante la spertojn pri la 9-a kongreso, tiuj postuloj pri granda aŭtonomio de la Organiza komitato alfrontis akran kontraŭstaron en la Estraro de KEL,

kiu opiniis, ke tiu ĉi aranĝo estas en ekskluziva kompetento de KEL, kaj ke la kondiĉoj kiujn postulas DEC estas neakcepteblaj. La opinio de DEC estis, ke la aranĝo ekde sia komenco havas la nomon "kongreso de kroataj esperantistoj" (kaj ne "kongreso de KEL"), ke por ĝia organizado ne estas antaŭviditaj reguloj (kvankam de pluraj flankoj tiaj postuloj iris al KEL dum kelkaj pasintaj jaroj), kaj ke KEL mem opiniis, ke la loka organizanto devas por tiu aranĝo havigi financojn, homojn kaj preni kompletan riskon. Aliflanke, KEL per nenio kontribuas al tiu aranĝo. Pro tio el la vidpunkto de DEC estis logike propni la 7 punktojn. Ĉar la jaro estis escepte ekonomie malfacila, estis neniu alia kandidato, kaj KEL havis nenian akcepteblan kaŭzon por rifuzi la proponon de DEC.

En la interreta kunsido de la 25-an de aŭgusto 2011, la Estraro de KEL akceptis la kandidatiĝon, kaj la 27-an de septembro estis subskribita kontrakto inter KEL kaj DEC, per kiu estis akceptitaj ĉiuj postuloj de DEC el la kandidatiĝletero.

Pri la decido de KEL, DEC letere informis la Urbon Koprivnica kaj la Departementon Koprivnica-Križevci, kaj la 12-an de oktobro 2011 formis la Organizan komitaton kiu konsistis el: **Zdravko Seleš** (prezidanto), **Josip Pleadin** (sekretario), **Nada Pleadin** (kasisto), **Martin Mihaldinec**, **Zdenka Polašek**, **Grozdana Grubišić-Popović**, **Spomenka Štimec** (representanto de KEL), **Velimir Piškorec** kaj **Krunoslav Puškar**.

En oktobro 2011 estis senditaj monpetoj al estontaj aŭspiciantoj.

La 16-an de novembro 2011 la urbestro de Koprivnica, **Zvonimir Mršić**, akceptis la aŭspicion de la kongreso.

En la portalo Ipernity estis formita kongresa retpaĝaro. Monpetoj senditaj al la industrioj "Podravka" kaj "Carlsberg", kaj al Ministerio pri turismo ne havis pozitivan reeĥon.

LA REZULTOJ

La plej grandan parton de la kongresaj preparoj gvidis la kongresa sekretario, kiu kunordigis la interkonsentojn kun la prezidanto de la Organiza komitato **Zdravko Seleš**. **Zdenka Polašek** estis engaĝita pri la kongresa programo, informado, varbado kaj organizado de la kunveno de brigadanoj. **Nada Pleadin** gvidis la kongresajn financojn kaj la akceptejoj en la Hotelo "Podravina" kaj en la Koncertejo "Domoljub". **Grozdana Grubišić-Popović** kaj **Kruno Puškar** tandem gvidis la programon, **Martin Mihaldinec** partoprenis en la interparoloj kun sponsoroj, aparte kun la Urba muzeo de Koprivnica, Turisma asocio de la Departemento kaj la Biblioteko "Fran Galović" en Koprivnica. **Velimir Piškorec** nur konsile partoprenis la laboron, ĉar lia fako (la simpozio), pro monmanko ne okazis. **Spomenka Štimec** kontribuis per informado. Ĉe la kongresa akceptejo deĵoris **Mihaela Cik**, **Dijana Muhvić**, **Maja Prelec** kaj **Hrvoje Herent**.

Bonvenigajn leterojn al la kongreso sendis la urbestro de Koprivnica **Vesna Željeznjak** kaj la departementestro **Darko Koren**. Dum la kongreso la aŭspiciantojn reprezentis **Helena Hećimović**, la konsilistino de la urbestro, kaj la anstataŭanto de la departementestro **Ivan Pal**, kiuj faris ankaŭ salutparoladojn.

La kongresa programo estis dividita je labora (vendredon,

la 22-an de junio), kultura kaj turisma (sabaton, la 23-an de junio) kaj amuza partoj (dimanĉon, la 24-an de junio).

En la labora parto okazis la jarkunveno de KEL, kiu daŭris pli ol ses horojn kaj per tio malebligis aŭ prokrastigis kelkajn aliajn programojn. Malfruis la prelego de **Zlatko Tišljar** pri Tibor Sekelj, la libreprezento de **Zdravko Seleš** "Songoj kaj ombroj", la koncerto de la itala kantisto **Manüel**, kaj la kunveno de brigadanoj, dum entute ne okazis la prelegoj de **Ljubomir Trifončovski**, **Stefan MacGill** kaj **Smail Grbo**. La ĉefa rezulto de la jarkunveno estis, por la unua fojo preparita, detala esplorrezultoj de la Kontrola komitato.

La planita vizito al Muzeo de nutrado "Podravka" okazis kun malfruo, sed interkonsente kun la direktorino **Nada Matijaško**, kiu estis nia ĉiĉerono, tamen sukcese.

Laŭplane okazis la tagmanĝo la 22-an, dum la samtaga vespermanĝo ankaŭ malfruis, pro la jam menciita jarkunveno. Dum la kunveno de brigadanoj okazis projekciado de malnovaj fotoj kaj muzike agrabligis la vesperon la disko-jokeo **Dragan Petrović**.

La kultura programparto okazinta la 23-an, funkciis senprobleme. Speciala kongresa buso el Zagrebo venis senprokraste (la grupgvidantino estis **Marija Jerković**). Dum la programo prezentis la himnojn kaj kant- kaj danc-programon la **Kulturarta societo Koprivnica**. Post la salutvortoj de la aŭspiciantoj, la kongreson salutis ankaŭ alilandaj reprezentantoj, kaj **Béla Kovács** el Kaposvár tralegis la leteron de la urbestro de Kaposvár **Károly Szita** por la urbestro de la ĝemelurbo Koprivnica **Vesna Željeznjak**.

Post la oficiala parto sekvis paŭzo por komuna fotado, post kio en la Malgranda scenejo de la Koncertejo "Domoljub" okazis paŭzo por refreŝiĝo. Per kukabundo

regalis nin **Marijanka Pleadin**, kaj la trinkaĵojn financis la Organiza komitato.

Postpaŭze en la programo sekvis la kabaredca programo de **Saša Pilipović** "Posttagmezo kun Saša", kaj la omaĝoj al la forpasinta aktorino **Vida Jerman** kaj al nesufiĉe konata Esperanto-poeto **Đuro Rašan**, kies familianoj partoprenis la kongreson. La poemojn de **Rašan** recitis **Saša Pilipović**. La antaŭe planita honorigo de **Vida Jerman** per Premio Kalendulo ne okazis malgraŭ la decido ke ĝi estu atribuita al la fama aktorino postmorte, sed anstataŭ tio estis projekciitaj ŝiaj fotoj kaj **Neven Mrzlečki** kantis en Esperanto la kanton "La golondrina", per kiu li adiaŭs de sia kunlaborantino **Vida** ankaŭ en la tombejo de Mirogoj en Zagreb, decembre 2011.

Sian intencon organizi la 11-an kongreson en Sisak kaj Petrinja, de la kongresa scenejo lanĉis **Nataša Dorosulić** nome de ambaŭurbaj Esperanto-societoj.

La kulturalan programparton finis **Neven Mrzlečki** per kantado de la eŭropa himno en Esperanto, sojle de la sekvontsomera plenrajta membreco de Kroatio en Eŭropa Unio.

Komuna tagmanĝo por ĉiuj kongresanoj estis organizita en la Hotelo "Podravina". Sekvis la turisma parto de la aranĝo, gvidanta la kongresanojn tra la plej interesaj lokoj de la regiono de Podravino. Je la 16h00 per tri busoj de la kompanio "Čazmatrans" la kongresanoj venis al Koprivnički Bregi, la naskiĝvilaĝo de konata esperantisto-fervojesto **Ilija Puhalo**. Tie atendis nin la reprezentantoj de la Komunumo Koprivnički Bregi, kiuj preparis mallongan kulturalan programon en kiu prezentiĝis infanoj de **Kulturarta societo "Rudar"** el la proksima vilaĝo Glogovac. La oficialan programon gvidis s-ro **Mustaf** (reprezentanto de la Komunumo) kaj **Grozdana**



Grubišić-Popović (reprezentanto de la Organiza komitato). La alvenintojn salutis **Darko Sobota**, prezidanto de la Komunuma konsilio, kaj sekvis impresaj paroladoj de **István Gulyas**, la reprezentanto de IFEF kaj **Marica Brletić**, la reprezentantino de la fervojistoj-esperantistoj el Zagrebo, kiuj parolis pri la graveco de **Ilija Puhalo** por la internacia fervojista esperantista movado. Nome de Kroata Esperanto-Ligo la ĉeestintojn salutis la vicprezidanto **Radenko Milošević**.

La ĉefa celo de la esperantista vizito al Koprivnički Bregi estis starigo de la memortabulo al **Ilija Puhalo** okaze de la 75-a datreveno de lia morto. La starigon de la memortabulo iniciatis Dokumenta Esperanto-Centro, kaj la propono ricevis grandan reŝon en la Komunumo Koprivnički Bregi, kiu pagis ĉiujn kostojn de la aranĝo. La memortabulon ĉizis ŝtonĉizisto **Miroslav Bos** el Glogovac, kaj la Esperantan flagon, per kiu ĝi estis kovrita, komune deprenis **Darko Sobota** kaj **Josip Pleadin**. La flagon **Pleadin** simbole transdonis al la reprezentanto de la Komunumo **Darko Sobota** kaj poste faris Esperantlingvan paroladon pri la epoko de Esperanto en Koprivnički Bregi, kiun amplekse priskribas ankaŭ la oficiala retejo de la Komunumo.

La kongresa ekskurso plue iris al vilaĝo Hlebine, la naskiĝloko de la kroata naiva (pentro)arto, kie la kongresanoj vizitis la Galerion de naiva arto, tra kiu ilin gvidis la direktoro de la Muzeo de urbo Koprivnica (sub kies zorgo troviĝas la Galerio), s-ro **Marijan Špoljar**.

La laste vizitita loko estis Ĝurdevac, la sidloko de Dokumenta Esperanto-Centro kiu organizis la kongreson. En Ĝurdevac tiutage okazadis la centra programo de la fama "Legendo pri Kokoj" (konata sub la nomo "Picokijada"). La

kongresanoj spektis tre impresan teatraĵon sur la ekstera scenejo ĉe la fortikaĵo Malnova urbo kaj la postan piroteknikan spektaklon, kiu finiĝis je noktomezo. En la busoj, kiuj retransportis la kongresanojn al Koprivnica (kaj la zagreban grupon al Zagrebo), la kongresanoj ricevis komunajn kongresajn fotojn.

La lasta kongresa tago estis dimanĉo, dum kiu kelkaj kongresanoj eluzis la senpagan sinbanadon en la Urbaj naĝbasenoj Cerine, kaj kvardeko da plej obstinaj transportiĝis per privataj aŭtomobiloj al la vinberejo de **Josip Kolarević** en Mali Kostanj apud Ĝurdevac, kie okazis pikniko organizita de la dommastro **Kolarević** kaj de **Marijanka Pleadin**.

El aliaj rezultoj de la kongreso menciendas la ekspozicio pri Esperanto en la Biblioteko kaj legejo "Fran Galović" en Koprivnica, la filatela koverto eldonita de Filatelista societo Koprivnica kaj la lumdisko "Neven Mrzlečki kantas por vi". Krome, estis eldonitaj diskoj kun kongresaj fotoj kaj kongresa filmo. Pri tiuj eldonaĵoj vi povas legi aliloke en ĉi tiu numero de nia gazeto. La oficiala filmisto **Sinša Milašinović** transdonis al DEC preskaŭ 7-horan filmitan materialon por la arkivo.

Pri la kongreso informis "Podravski list", "Slobodna Dalmacija", "La Ondo de Esperanto", "Juna amiko", "Esperanto-revuo", "Tempo", la portaloj de "La balta ondo", Kroata Esperanto-Ligo, Urbo Ĝurdevac, Urbo Koprivnica, Komunumo Koprivnički Bregi, Departemento Koprivnica-Križevci, sed la liston oni ankoraŭ ne kompletigis. Du prikongresajn elsendojn filmis televida kanalo VTV el Varaždin.

Al la kongreso aliĝis 180 personoj, sed efektive partoprenis ĝin 140. La partoprenintoj venis el multaj kroataj urboj, sed 35 kongresanoj estis eksterlandaj

esperantistoj el 14 landoj de 4 kontinentoj (Aŭstralio, Bosnio kaj Hercegovino, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Hungario, Italio, Kanado, Kubo, Nov-Zelando, Pollando, Rumanio, Serbio kaj Slovenio). Tio estas absoluta rekordo kompare kun ĉiuj ĝisnunaj kongresoj rilate la internaciajn dimensiojn de la aranĝo, kio estas sendube la rezulto de la laboro de **Zdenka Polašek** kaj **Josip Pleadin**.

Krom la grandega helpo de la aŭspiciantoj (Urbo Koprivnica kaj Departemento Koprivnica-Križevci), la kongreson sponsoris la transportentrepreno "Ĉazmatrans", Urbo Križevci, Hotelo "Podravina", Biblioteko kaj legejo "Fran Galović", Kulturarta societo Koprivnica, Muzeo de urbo Koprivnica, Muzeo de nutrado "Podravka", Komunumo Koprivnički Bregi, Popola malferma universitato Koprivnica, Turisma asocio de Urbo Ĝurdevac kaj Turisma asocio de Departemento Koprivnica-Križevci, kaj tre entuziasme helpadis multaj oficialuloj kaj amikoj, speciale listigitaj en la Kongresa libro.

Fine, ni menciuj, ke la kongreso okazis en la Koncertejo "Domoljub", por kiu la esperantistoj estas historie ligitaj: samloke okazis ankaŭ la 7-a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj en 1934. La jubilea kongreso estis ankaŭ bona okazo por skizi la regionan Esperanto-historion, kiu aperis riĉe ilustrita en la Kongresa libro.

La financa raporto konigas al ni la kostojn de la kongreso. La aranĝo kostis proksimume 10.000 eŭrojn. Monforme atingis la kongresan kason 45.541,98 kunaĵoj, dum la reston konsistigis senpagaj servoj kaj donacoj de diversaj sponsoroj.

Niajn gratulojn al la Organiza komitato kiu kuraĝis, en la ekstreme malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj, sur sian dorson preni kaj realigi tiel grandan projekton!



DESETI KONGRES HRVATSKIH ESPERANTISTA
DEKA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ



SINTENO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ PRI NEŬTRALA EŬROPA LINGVO

 Krunoslav Puškar

Krunoslav Puškar (naskiĝis en 1986, esperantistiĝis en 2008), diplomiĝis pri la angla la 1-an de februaro 2012 en la Filozofia fakultato de Zagrebo per diplomlaboraĵo el la interligvistika kampo, pli precize esperantologio. Kvankam la esploro pretis jam pasintjare, kiam la aŭtoro prezentis siajn rezultojn ĉe la Zagreba lingvistika rondo, la 15-an de marto 2011, la tuta laboraĵo estis transdonita al ekzamena komisiono nur kiam ĝin ekakompanis ampleksa kaj aŭtentika teoria trarigardo. La enhavriĉan 180-paĝan verkon, kiu entute estis preparita kaj esplorita dum du jaroj, la aŭtoro defendis antaŭ sia mentoro Damir Kalogjera, emerita profesoro, kaj antaŭ du doktoroj-komisionanoj: Milan Mateusz Stanojević kaj Velimir Piškorec. Parta resumo de la verko kiu ĝenerale pritraktas la sintenojn de kroataj esperantistoj al Esperanto estas prezentita ĉi-sube.

Vi vidas, ke ni batalas por afero, kiu alportos al la homaro grandegan utilon kaj kiu pli aŭ malpli frue nepre estos atingita. Ĉiu prudenta homo povas sekve kuraĝe aliĝi al ni, ne timante la mokojn de la malsaĝa kaj nepensanta amaso. Ni batalas por afero tute pripensita kaj certa, kaj tial neniam mokoj nek atakoj nin debatos de la vojo. La estonteco apartenas al ni. Ni supozu eĉ, ke tiu formo de lingvo internacia, por kiu ni batalas, montriĝos en la estonteco kiel erara kaj ke venonta lingvo internacia estos ne tiu, kiun ni elektis, — sed tio ĉi ja tute nin ne devas konfuzi, ĉar ni batalas ne por la formo, sed por la ideo, kaj formon konkretan al nia batalado ni donis nur tial, ke ĉia batalado abstrakta kaj teoria ordinare al nenio kondukas.

L. L. Zamenhof
(1859-1917),
Esenco kaj estonteco

La ĉefa celo de la laboraĵo estis pritrakti la koncepton de lingvafrankao kadre de la unuiĝinta Eŭropo kaj kompari la anglan kaj Esperanton kiel eblajn kandidatojn kiuj povus efektive plenumi tiun rolon. Por doni gravecon al tiu ĉi

esploro, 108 kroataj esperantistoj, kiel la plej informitaj konantoj de la tuta Esperanta fenomeno, estis demanditaj pri siaj sintenoj al la kompleksa soci-, eko- kaj interlingvistika afero per ampleksa enketilo. Pro limigitaj spaceblecoj de tiu ĉi verko ni ne prezentos la enhavoplenan teorion fonon kiu estis antaŭmetita al la esploro, kaj ĉi tie ni okupiĝos nur pri la sintenesplorado.

La ĉefa motivo kial ni decidis enketi esperantistojn estas la jena: ne ekzistas multaj multifacetaj sociolingvistikaj esploroj pri Esperanto el esperantista vidpunkto. Al tiu penso instigis nin plejparte la esploro de Starĉević & Geld (2008), kiu por sia temo havis Esperanton, sed el neesperantista vidpunkto. Nia opinie, tiu esploro estas tute certa grava kaj valida por ke ni pli precize komprenu kiel la neesperantistaro perceptas Esperanton kaj ĝian movadon, sed ĝi ne pretendas doni la tutan kadron de la Esperantofenomeno, kiun povas liveri nur spertaj esperantistaj partoprenantoj. Tiurilate ni devas emfazi, ke ĉi tiu esploro far esperantistoj pri la esperantistaro ne devas signifi ke ĝi estas subordigita al centprocenta

subjektiveco. Tiu ĉi scienc esplora laboro ankaŭ tion atestos.

LA SAMPLO

La sampro de niaj partoprenintoj konsistis el ambaŭseksaj membroj de Kroata Esperanto-Ligo, kaj aktivaj kaj (plu) neaktivaj movadanoj. La proporcio de inaj kaj viraj partoprenintoj estis ekvilibrigita; precize 54 viroj kaj 54 virinoj partoprenis la esploron. La averaĝa aĝo de la entuta sampro, kiu aĝas ekde 14 ĝis 89 jaroj, montras ke la esperantistara aĝstrukturo estas tre alta kaj maltrankviliga: 49,28 jaroj. koncerne la edukon de la partoprenintoj, la rezultoj montris, ke esperantistoj estas ĝenerale altedukitaj; 57,41% da partoprenintoj indikis ke ili finis aŭ baldaŭ finos iun altlernejon aŭ universitaton. Alia variabla montras al ni, ke Esperanto plejparte alireblas en urboj kaj urbetoj: 95,33%.

Resume, la hodiaŭa kroata Esperanto-movado estas ĉefe tre maljuna movado konsistanta el altedukitaj individuoj vivantaj en urbaj sferoj. Tio ĉi diras multe rilate al alirebleco de la movado kaj la lingvo, sed efektive okulfrapas



la alta aĝstrukturo. Ni devas nin demandi kial kaj kiel tio okazis kaj ĉu la kreskotendenco de la alta jaraĝo daŭros?

LA ENKETO

Sed tiu ĉi esplorparto estis nur kolaterala parto de la studo kiun ni realigis ĉe niaj partoprenintoj por havi enrigardon en la strukturon de la enketita movado. La ĉefa celo de nia esploro rilatis al gravaj demandoj koncerne la Esperanto-fenomenon, la strukturon de Esperanto kaj la Esperanto-movadon. Entute, la partoprenintoj respondis al speciale konstruita 33-demanda enketilo per unu el 3 respondeblecoj (JES, NE kaj EBLE). Bv. kompari la Tabelojn 1, 2 kaj 3 ĉi-sube por vidi la esplorrezultojn:

LA REZULTOJ

Tabelo 1.

Sintenoj de esperantistoj al la strukturo de Esperanto.

Koncerne ĝian strukturon, kroataj esperantistoj konsideras Esperanton certagrade eŭropo-centrema lingvo (JES: 43,81%; EBLE: 28,57%), sed sen konsiderinda slava vortokvanto (nur 47,12% jese), kies vortotrezoro estas, eble pro la sama kialo, relative facile alproprigebla (80%). Menciendas, ke ĉi tiu respondo ĉefe respegulas niajn supozojn. Tamen, male al niaj supozoj, Esperanto ne estas perceptita ke ĝi inkluzivas tro da neologismoj (kiel *tarda* anstataŭ *malfrua*, aŭ *turpa* anstataŭ *malbela*) kaj nebezonaĵojn sinonimoj (kiel *malliberejo*, *arestejo*, *karcero*, *prizono*) (76,19%). Ĉi tiun respondon ni povas interpreti per du eblecoj: 1) ĉiuj niaj partoprenintoj entute ne estis multe ekspozitaj al diversaj vortregistroj, aŭ 2) la troa aro da neologismoj kaj sinonimoj estas

ĝenerale plenkvalita far Esperanto-kritikantoj, kaj niaj partoprenintoj ilin pro tio ne rimarkis. Plue, estas vere interese emfazi ke, kvankam oni perceptas ke Esperanto posedas tute simplan gramatikan strukturon (95,33%) kaj ke ĝi estas ĉefe logika lingvo (75,24%), ĝi, male, ne estas konsiderata tre simpla (74,53%). Ĉi tion ĝenerale estas malfacile interpreti, sed unu el (niaj) eblaj respondoj al tio estas la internacia vortrezoro, kiu kelkkaze ne tute identas en Esperanto kaj en alia lingvo, kaj pro tio ĝi malfacile apropiĝeblas en la komenco. Krome, kroataj Esperanto-parolantoj ankaŭ tute ne certas ĉu la lingvo estas same melodia kiel kelkaj latinidaj lingvoj (JES: 59,05%; EBLE: 21,90%), kio, tujprave, estas subjektiva kriterio. Ĉiukaze, la lingvo ne estas juĝita kiel seksista (87,50%) kaj troe artefarita lingvo (88,79%).

Laŭ nia opinio, estontaj studaĵoj povus pritrakti inan kaj masklan prijuĝon koncerne la seksan diskriminacion. Ankaŭ, la sintenoj de komencantoj kaj progresintaj parolantoj povus esti esploritaj kaj kontrastitaj rilate al la lingva strukturo kaj komplikeco. Konklude, ni povas diri ke kroataj Esperanto-parolantoj relative konscias pri la lingva 'malperfekteco', sed ili, kiel sperta lingva komunumo, tendencas ilin akcepti.

Tabelo 2.

Sintenoj de esperantistoj al la movado.

La sama lingva komunumo donis ankaŭ utilan informon pri si mem. Laŭ ĝi, la Esperanto-movado ankoraŭ ne mortis (72,64%), ĉar ĝi sukcesis krei sian originalan kulturon (73,08%) kaj ĉar ankoraŭ ekzistas relative, sed ne tre, sufiĉa nombro da Esperanto-aranĝoj kaj kongresoj (50%). Same, la Esperanto-komunumo ankoraŭ ne

spertis getoiĝon (54,72%), kvankam, laŭ la opinio de la sama komunumo, Esperanto, pro iu kialo, ne estas sufiĉe propagandita (94,39%). Plue, kroataj esperantistoj agnoskas ke ili ne havas sufiĉan nombron da lingvoinstruistoj (76,19%), kion, tute certe, oni povas konsideri kiel unu el la eblaj kaŭzoj kial la lingvo ne disvastiĝas tra la mondo kiel ĝi aspiris. Interese, laŭ la esploro oni ne havas sufiĉan nombron da denaskuloj (64,08%) kaj, certagrade, ankaŭ kelkaj multjaraj esperantistoj havas malfacilaĵojn koncerne la kompletan Esperanto-alproprigon - pro kio ili estas pli konataj kiel eternaj komencantoj (JES: 18,87%; EBLE: 30,19%).

Laŭ nia opinio, estonta esplorado pri la Esperanto-komunumo devus esplori esperantistan agadon en la movado, tio estas, ĝian kontribuon al la Esperanto-komunumo, kaj ankaŭ memperceptitajn kialojn por tio, por ke ni trovu pli da utilaj informoj pri la movada strukturo.

Tabelo 3.

Esperantistara percepto de Esperanto.

Koncerne la Esperanto-fenomenon ĝenerale, la esploro montris, ke ĉiuj povas iĝi sukcesaj parolantoj de Esperanto (76,85%), sed ĝi ankaŭ certagrade indikis, ke haveblas kelkaj eĉ pli facile alproprigeblaj lingvoj ol Esperanto (EBLE: 33,64%). Interese, la lingvo estas konsiderita tre malfacila por neeŭropanoj (JES: 54,12%; EBLE: 42,05%), kiuj ne estas sciantoj de iu hindeŭropa lingvo. Tamen, kroataj esperantistoj ne certas ĉu la lernado de Esperanto inkluzivas certagrade bonan konadon de lingvistiko (JES: 42,99%; NE: 40,19%), aŭ, alivorte, ili ne certas ĉu oni bezonas iaspecan lingvistikan trejnadon antaŭ Esperanto-lernado. Ĉiukaze, laŭ konsiderinda nombro da ili (70,75%), ankaŭ Esperanto spertas

ŝanĝojn same kiel naturaj lingvoj, kaj ĝi ne estas konsiderata tre malsama kompare kun ili (62,26%). Por kroata esperantistaro, la fakto, ke Esperanto estas nenacia lingvo, estas efektive avantaĝo (80,37%), kaj ĝi ne estas konsiderata redunda, kvankam la angla hodiaŭ superpotence figuras (94,39%). Tamen, Esperanto ne estas perceptita kiel nepra je la internacia nivelo (41,35%), ĉar ĝi, interalie,

estas rimarkinde malpli reprezentita en amaskomunikiloj (95,37%). Plue, male al la konata konvinko, Esperanto ne kapablas plirapidigi la pereadon de diversaj lingvoj kaj dialektoj (76,41%). Ankaŭ, en la esperantista opinio, Esperanto povas kunligi ĉiujn naciojn (59,81%) kaj ebligi komunikadon kun esperantistoj el malsamaj landoj samgrade (74,06%).

Rezulte, ni povus diri, ke

kroataj esperantistoj fiksas klaran kaj objektivan dividlinion inter ĉefaj antaŭjuĝoj kaj iliaj korespondaj konkretaĵoj. Estas superflue diri, ke la esplorzultoj motritaj en tiu ĉi artikolo estas nur skeleto kaj parto de nia ampleksa esploro, sed tamen ni esperas, ke ili donas firman superrigardon super pensinstigaj kaj gravaj socilingvistikaj demandoj kaj respondoj, pri kiuj interesiĝas kaj esperantistoj kaj neesperantistoj.

DANKESPRIMOJ

Mi elkore dankas al ĉiuj esperantistoj, kiuj en pluraj manieroj ebligis evoluon kaj realigon de tiu ĉi sciencspora laboro: ĉu partopreninte la ekzamenadon ĉu dissendon de la demandilo. Rilate la esploron, mi vere multegon ŝuldas al la sekretariino de Kroata Esperanto-Ligo. Informinte min pri Esperanto, konsilinte min pri kaj pruntinte al mi aregon da libroj koncerne la lingvon, kaj finfine kunhelpinte en la serĉado de partoprenantoj, ŝi faris grandegan kontribuon al mia esploro. Mi ankaŭ elkore dankas al ĉiuj, kiuj dum, sed pli grave antaŭ la sama esploro, instigis mian intereson kaj entuziasmon pri interlingvistiko kaj aparte pri la fenomeno de Esperanto. Mi dankas al tiuj noblaj esperantistoj.

ESPERANTO KAJ JOGO

Ĉu vi opinias, ke ne ekzistas kunligo inter tiuj du aferoj? Vi malpravas. Jam tri jarojn mi instruas Esperanton al plenkreskuloj en la zagreba urboparto. Ni ĉiuj ĝuas. Malrapide ni progresas, iomete ŝercas, iomete trinkas vinon, sed ni ĉiuj legas Esperantlingvajn tekstojn, solvas taskojn kaj parolas Esperante.

Ĉu vi opinias, ke tio ne estas bona metodo por instrui Esperanton? Denove vi malpravas.

Ni ĉiuj fariĝis Esperantaj amikoj. Ni kune vizitas teatrajn programojn, ekskursas kaj ĉiam ridas. Ni kune partoprenas la kroatajn kongresojn, aŭskultas Esperantajn prelegojn kaj kantojn.

Kaj kio pri jogo?

Dufoje semajne mi praktikas jagon. Pasintfoje, kuŝante sur la planko, mi aŭdis la demandon: "Ĉu vi estas esperantistino?"

Mi tre surpriziĝis. Turninte la kapon mi ekvidis



Marija Jerković

nekonatan sinjorinon, sed mi respondis: "Jes".

"Ĉu vi nomiĝas Marija Jerković?", ŝi demandis.

Mi respondis jese.

"Mi estas Milena Borjan.", ŝi diris, "Mi iam lernis Esperanton".

"Mi ĝojas, venu kaj lernu kun ni en Utrine!"

Ŝi akceptis kaj venis al nia kunveno. Miaj samgrupaninoj estis tre ĝojaj! Nova esperantistino, nova amikino!

Ni interparolis iomete Esperante, sed poste mi interesiĝis

pri nia nova membrino, kaj pri la familia nomo Borjan.

Jes, Bude Borjan estis ŝia onklo. Ŝi rakontis pri sia onklo, pri liaj Esperantaj kaj militaj tagoj, kaj pri tio, ke la fama kroata Esperanto-societo portis la nomon "Bude Borjan", honore al ŝia onklo. Ĉu ne mirakle ke ni, Milena kaj mi, renkontiĝis kuŝante planke kaj praktikante jagon?

Kion ankoraŭ mi diru? Ĉu jogo estas miraklo, aŭ Esperanto estas mirakla afero kiu kunigas homojn?

Vi mem respondu!



SEN JUNULOJ ESPERANTO NE POVAS HAVI ESTONTECON

INTERVJUEO KUN PROFESORO KRUNOSLAV PUŠKAR

Josip Pleadin

La juna profesoro de anglistiko kaj germanistiko **Krunoslav Puškar**, dum someraj monatoj de tri pasintaj jaroj gvidis jam kvin laborejojn pri Esperanto en la Urba biblioteko "Franjo Marković" en Križevci, kiujn partoprenis plurduko de divers- aĝaj personoj, ĉefe junaj, kiuj mallonge okupiĝis pri lingvistiko, havis rapidan kurson de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo, skribis teston kaj ricevis atestilojn. En la biblioteko la partoprenintoj havis je dispono la necesan literaturon por prunti kaj uzi ĝin, kaj ĉiuj ĝisnunaj laborejoj estis senpagaj, dank' al la entuziasmo de la preleginta profesoro Puškar.

La redakcio de "Zagreba Esperantisto" eluzas tiun la okazon por intervjuo kun s-ano Puškar.

★ Niajn legantojn certe interesos kiu estas Krunoslav Puškar?

– Ĉu? Mi pensas ke vi jam diris preskaŭ ĉion pri mi! Sed, do, se ni volas doni komunan denominatoron al mia biografio, ni povus mallonge diri, ke mi estas granda ŝatanto kaj entuziasmulo pri lingvo(j).

★ De kie via intereso pri lingvoj, kaj aparte la intereso pri Esperanto?

– Tio estas vere interesa kaj tre trafa demando! Ĉu vi deziras longan aŭ mallongan respondon pri mia lingva biografio? Mi povus kurte diri, ke mia intereso pri lingvoj plejparte devenas de la ĉirkaŭaĵo



kaj diversaj cirkonstancoj en kiuj mi plenkreskadis kaj formiĝadis kiel persono. Ekzemple, pro miaj gepatroj mi interesiĝis pri mia loka kajkava, pro miaj geonkloj kiuj transloĝiĝis al Usono mi estis ravita pri la angla, pro mia bonega gimnazia profesorino de la germana mi fasciniĝis pri tiu lingvo, pro la latina kiu plaĉis al mi mi ankaŭ okupiĝis pri la itala, ktp. Jam en la unua klaso de gimnazio mi sciis ke mi studos la anglan kaj la germanan, ĉar tio ŝajnis saĝa kaj prudenta decido, sed kiam mi komencis studi la du lingvojn, mi perceptis, ke mi interesiĝas ne nur pri ili kaj iliaj fenomenoj, sed ankaŭ pri aliaj lingvoj. Ĝuste pro tio mi komencis studi ankaŭ la ĉinan kaj la japanan, sed, antaŭ tio, mi komencis serioze okupiĝi pri Esperanto.

Koncerne mian esperantistigon mi pensas, ke ĝis nun preskaŭ la tuta kroata Esperantomovado scias, ke la ĉefa "kulpulo" pro mia okupiĝo pri Esperanto estas, kompreneble, d-ro Velimir

Piškorec kiu, okaziginte kolecion *Interlingvistiko kaj la strukturo de Esperanto* ĉe la zagreba Filozofia fakultato, allogis aron da entuziasmiĝintoj pri tiaj ligv(istik) aj frandaĵoj – inter kiuj ankaŭ min. La kolegio kaj la posta propra okupiĝo pri "la fenomeno Esperanto" donis al mi valorajn konojn pri aliaj signifaj lingvaj aspektoj – la demandoj de identeco kaj egalrajteco. La propagandita Esperanto-paradigmo fundamente ŝanĝis miajn ĝistiamajn rezonadojn pri lingvo kaj konsiderinde influis miajn novajn sintenojn al ĝia rolo. Krome, dank' al la konata diraĵo: "en via hejmloko parolu vian lokan lingvon, en via hejmlando parolu vian nacian lingvon kaj en la mondo parolu Esperanton!" mi grave ekokupiĝis pri mia loka kajkava kaj nun mi estas en la procezo de ellaborado de la granda vortaro kiu estos bazita sur diversaj lokaj idiomoj. Mallonge, Esperanto instruis min percepti kaj kompreni variajn sferojn de lingvo kaj vere apreci mian propran lokan lingvon.

★ Ĉu vi bonvolus diri kiel naskiĝis la ideo pri la somera Esperanto-instruado en Križevci, kiu donis al vi la necesan subtenon kaj kia estis la intereso de civitanoj por via projekto?

– Konsciente pri la fakto ke en Križevci ne ekzistas esperantistoj, antaŭ du jaroj mi kuraĝis kontakti la Urban bibliotekon "Franjo Marković" kaj demandi ĉi ili permesus okazigi en iliaj ejoj kurson de Esperanto. Kiel konate, ili respondis jese kaj helpis okazigi en 2010 kaj 2011 po du somerajn senpagajn laborejojn, kaj ĉi-jare unu. Sen la grandega

intereso kaj subteno de la Biblioteko la someraj Esperanto-okazaĵoj en Križevci tute certe ne estus tiel sukcesaj, kaj finfine Esperanto ne estus konata al tioma nombro da miaj samurbanoj. Konklude oni povas diri, ke dank' al la Biblioteko la intereso pri la lingvo estis serioze vekita.

★ Kaj la rezultoj? Ĉu vi povas kompari la rezultojn?

– Ankaŭ la rezultoj ne mankas. En 2010, kvardek personoj akiris komencantan Esperanto-atestilon kaj en 2011 - dudek. La kialo ke en 2011 duonigis la nombro de partoprenintoj kompare kun 2010, estas la fakto ke la laborejo en 2011 daŭris unu plian semajnon, kaj estis multfacete pli intensa kaj informriĉa. Kompare kun la jaroj 2010 kaj 2012, dum kiuj la la laborejoj estis pli-malpli nuraj Esperanto-kursoj, la laborejo okazinta en 2011 plejparte aspektis kiel instruado por esperantistoj, ĉar la historio, kulturo, muziko kaj la lingvo mem estis pli serioze traktitaj. Tiu ĉi entrepreno rezultis ĉe 20 esperantistoj per pli grandaj lingvaj spertaj.

Plue, ĉi-jare 20 novaj komencantoj ricevis atestilojn pri elementa Esperanto-scio, sed 8 personoj el la antaŭaj kursoj ricevis B-diplomojn, kio vere plezurigas min. Dum la tri jaroj mi konvinkigis, ke la intereso pri Esperanto ekzistas, kaj ni povus progresi pli kaj pli koncerne la lingvon. Estus bedaŭrinde se la Esperanto-lernado nun haltus, ĉu ne?

★ Kion vi intencas plue fari por Esperanto? Ĉu vi daŭrigos la instruadon tradicie ĉiusomere?

–Espereble, la amasinstruado reokazos venontjare. Kontraŭe al la tri antaŭaj jaroj, en septembro ankaŭ komenciĝis daŭrigaj kursoj por la ĉi-jaraj kursanoj. Mi precipe interesiĝas pri diversaj renkontiĝoj kaj aktivecoj, kiuj ebligas al miaj kursanoj kaj mi mem pluan okupiĝon pri Esperanto. Ne estus malbone se oni okazigas iun landan

junularan renkontiĝon en Križevci. Mi pensas, ke tio montriĝus tre bona kaj trafa afero por la kroata Esperanto-movado.

★ En Križevci dum pasinteco ekzistis pli ampleksaj Esperantaj aktivecoj. En 1980-aj jaroj eĉ ekzistis la Esperanto-societo "Estonteco". Ĉi-jare vi refondis ĝin?

– Antaŭe mi pensis ke mi ne havas sufiĉan tempon por okupiĝi pri tio, ĉar temas pri tre serioza tasko kiu postulas multe da tempo je dispono kaj kompletan atenton dediĉitan al la organizado de ĉiuj facetoj de societa funkciado. Sed, instigita per la intereso de aliaj, mi diris: "Kial ne"! Ni devas provi! Kaj la 14-an de julio ĉi-jare okazis fondkunveno, kiun partoprenis kaj subtenis 15 miaj kursanoj. Do, la societo nun estas sukcese refondita kaj mi nur esperas ke ĝi ne estingiĝos! Ni klopodos ke tio ne okazu.

★ Kion vi opinias la ĉefa(j) obstaklo(j) por pli rapida disvastiĝo de Esperanto?

Miaopinie ekzistas tri obstakloj por pli rapida disvastiĝo de Esperanto. La unua obstaklo estas la fakto, ke homoj ankaŭ hodiaŭ, eĉ 125 jarojn post la invento de la lingvo, ne scias kio Esperanto estas kaj kiu ideo fakte staras malantaŭe la lingvo. Alivorte, la lingvo ankoraŭ ne apartenas al la moderna vivo kaj ekzistas granda dubo ĉu ĝi iam apartenos. Kialo por tio estas la dua obstaklo: diversaj (en la movado jam tute konataj) antaŭjuĝoj pri la lingvo kaj ĝia kreinto kiuj ĝenas al la sukcesa disvastiĝo de Esperanto. Por ŝanĝi tion ni, esperantistoj, devas daŭre sentivigi la publikon pri plurfacetaj avantaĝoj de la lingvo. Sed tio grandproporcie ne okazas kaj ĝuste tio montriĝas kiel la tria kaj tre grava obstaklo. Kial? Unuflanke, la tuta movado malprogresis kaj evidente malnoviĝis (mankas junaj kaj freŝaj homoj) kaj, aliflanke, la homaro ankoraŭ, 125 jarojn poste,

ne estas tute preta por Esperanto. Ni devas konfesi ke la ideo ankoraŭ estas iom revolucia. Ĉiuokaze, ni ne bezonas rompi niajn kapojn pri la preciza dato kiam la Esperanto-ideo estos akceptita kaj aprobata. Ni nur devas peni ke Esperanto floru. Tio estas nia unusola devo.

★ Via diplomlaboraĵo en la Filozofia fakultato rilatis al Esperanto. Kio estis ĝia temo kaj kiaj konkludoj de via esploro?

– Ĝuste. La temo de mia laboraĵo rilatis al sintenoj de kroataj esperantistoj pri neŭtrala lingvo Esperanto kadre de la unuiĝinta Eŭropo. Mallonge, la esplorrezultoj montris, ke kroataj esperantistoj havas objektivan dividlinion inter ĉefaj antaŭjuĝoj kaj la realeco koncerne la lingvon kaj la movadon. La esploro ofertas siaspecan superrigardon super la konataj Esperanto-kritikoj kaj plejparte pozitivaj respondoj de la kroata esperantistaro. Menciindas ke al tiu esploro plejparte instigis min la esploro de Starčević & Geld (2008), kiu por sia temo havis Esperanton, sed el neesperantista vidpunkto, kiu, kvankam grava kaj utila, ne donis la kompletan bildon al ni. Mi esperas ke mia esploro sukcesis kompletigi ĝin.

Sed, estas menciende, ke la esploro ankaŭ respektas generacian ŝanĝon. Inter 54 viroj kaj 54 virinoj kiuj partoprenis la esploradon (kiuj aĝas de 14 ĝis 89 jaroj), la averaĝa aĝstrukturo sumas je 49,28 jaroj, kio tute certe maltrankviligas. Tio estas nur kolaterala esplorparto, sed samtempe ĝia tre grava parto. Se ni volas havi Esperanton, ni devas havi movadon, kaj se ni volas havi movadon, ni devas ĉiam denove provi plijunigi (kaj fakte modernigi) ĝin. Mi tute ne certas kiu respondecas pri tio, kaj mi ankaŭ ne dezirus direkti mian fingron al iu, sed tio finfine ne gravas. Gravas ke Esperanto ne povas ekzisti sen siaj junaj parolantoj. Tio devas estis klara. Sen junuloj Esperanto ne povas havi estontecon.



Krunoslav Puškar

ESPERANTO "OFICIALE" PAROLATA EN KRIŽEVCI

Ekde la 14-an de julio 2012, en Križevci Esperanto estas ankaŭ "oficiale" parolata! Tiun daton en la Urba Biblioteko "Franjo Marković" en Križevci refondiĝis Esperanto-societo "Estonteco", daŭriganto de la samnoma societo, kiu aktivis en la 1980-aj jaroj.

Retrorigarde, la refondo montriĝis kiel logika sinsekvo de okazintaĵoj dum la tri lastaj jaroj, kiam la kvin escepte vizititajn Esperanto-laborejojn frekventis ĉirkaŭ 80 diversaj personoj, ravitaj de la facileco, simpleco kaj ideo de Esperanto. La refondkunvenon partoprenis 15 frekventintoj de unu el la kvin laborejoj kaj ĉeestis ankaŭ membroj de Bjelovara Esperantista

Societo kaj Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac.

Akcentindas, ke la kunvenon partoprenis ankaŭ **Dunja Šverko (Ĉkonjević)**, kunfondinto de la unua societo el la 1980-aj jaroj, kiu esprimis sian plezuron okaze de la refondo. La prezidanto de la refondita societo estas **Krunoslav Puškar**, la sekretario **Ana Bratić** (gimnazia abituriento), kaj kasistino **Petra Kačarovski** (juna profesorino pri biologio kaj kemio).

Estas grave elstarigi, ke krom la "Estonteco"-societoj, Križevci ne havis pli intensan kaj longperiodan Esperanto-agadon, male al aliaj urboj en Kroatio. Sed, la urbon trapasis kelkaj

Esperanto-eminentuloj, ekzemple la konata kroata kemiisto **Vladimir Njegovan**, la profesoroj **Josip Velebit** kaj **Milivoj Lozovina**, kaj la Esperanto-veterano **Rudolf Ljubić**.

Koncerne la ĉefajn celojn de la nuntempa societo, menciindas Esperanto-informado en la urbo, kunlaboro kun aliaj societoj en Kroatio kaj en eksterlando, precipe en la najbaraj regionoj, organizado de renkontiĝoj, komuna vizitado al eksterlandaj renkontiĝoj kaj kultura interŝanĝo, ĉio celanta ke Esperanto finfine enradikiĝu en la urbo. La logoo de la societo estas verdkolora suno samtempe simbolanta estontecon kaj esperon.



La programoj de "Estonteco" en 2012:

La 3-an de aŭgusto **Spomenka Štivec** prelegis pri Tibor Sekelj en la Urba biblioteko "Franjo Marković".

La 15-an de oktobro, okaze de Monato de kroata libro, pri "Josip Velebit - la grava kroata esperantisto", prelegis la estrino de la Biblioteko kaj legejo el Vrbovec **Nada Kušić**. La eventon partoprenis ankaŭ prezidantino de Kroatio Esperanto-Ligo **Judita Rey Hudeček**, kiu disdonis atestilojn al partoprenintoj de someraj laborejoj.



BRAZILAJ GEEDZOJ MENEGASSO EN KROATIO

Redakcia kompilo

Sur la fotoj:

- ① *La geedzoj Menegasso dum la akcepto ĉe la urbestro de Bjelovar*
- ② *La gastoj dum la tagmanĝo per kiu regalis ilin la urbestro de Bjelovar*
- ③ *Prelego en Sisak*
- ④ *La prelegantoj kaj la gastoj post la prelego en Sisak*
- ⑤ *Prelego en Petrinja*

Sian ĉi-someran eŭropan vojaĝon **Gilberto Menegasso** kaj lia edzino **Aparecida Mandarini Rodrigues Menegasso** el São Carlos (Brazilo) pasigis parte ankaŭ en Kroatio. De la 22-a ĝis la 24-a de junio ili partoprenis la 10-an kongreson de kroataj esperantistoj en Koprivnica, kaj post la kongreso faris kelkajn prelegojn en diversaj urboj de Kroatio.

La vojaĝon de la brazila paro en Kroatio planis Dokumenta Esperanto-Centro, kaj en la realigo partoprenis Bjelovara Esperantista Societo, Esperanto-societo "Sisak" kaj Esperanto-societo "Petrinja".

La 26-an de junio la geedzoj **Menegasso**, akompanitaj de **Franjo Forjan** kaj **Josip Pleadin** estis akceptitaj de la urbestro de Bjelovar s-ro **Antun Korušec**, kiu estas granda amiko de esperantistoj. En la agrabla interparolo kun siaj gastoj, sinjoro **Korušec** konigis al ili la urbon, kaj poste mem akompanis ilin dum vizito al Urba muzeo, kie akceptis ilin la direktoro **Mladen Medar** kaj la kustosinoj **Emilija Dragišić** kaj **Silvija Sitta**. Aparte agrabla gesto de la urbestro estis la tagmanĝo per kiu li regalis siajn gastojn.





Samtage, en la Popola biblioteko “Petar Preradović” en Bjelovar, ili prezentis en Esperanto (kun simultana traduko de **Josip Pleadin**) la projekciadon kaj prelegon “Brazilo - koninda lando”. La organizajn

aferojn pri la prelego faris **Zdenka Polašek** kaj **Franjo Franjan**, kunlabore kun la direktoro de la Biblioteko **Marinko Iličić**.

Tagon poste, la 27-an de junio, la brazilaj gastoj ekskursis en Lonjsko polje kaj en la "cikonia vilaĝo" Čigoč, tra kiuj gvidis ilin **Nataša Dorosulić**, prezidantino de Esperanto-societo "Sisak". Post la ekskurso, la gastoj tagmanĝis en la familia domo de Nataša, kaj ripetis la prelegon "Brazilo - koninda lando" en la Popola biblioteko kaj legejo “Vlado Gotovac” en Sisak kaj en la Kroata domo en Petrinja.

La prelego-serion de la geedzoj **Menegasso** en Kroatio salutis per sia letero ankaŭ la brazilia ambasadoro en Zagrebo, s-ro **Luiz Fernando G. de Athayde**.

Legu ankaŭ kroatlingvajn informojn:
<http://www.bjelovar.hr/vijesti/esperanto-prijem-gosti-gradonacelnik-kongres-esperantista/>
http://www.sisak.hr/clanak_/14523/program-sisacke-knjiznice

ESPERANTISTOJ ĈE LA FOIRO DE ASOCIOJ EN KARLOVAC

Sanja Damjanić

Inter la 28-a kaj la 30-a de septembro 2012 en Karlovac okazis la tradicia 4-a Foiro de asocioj (kroatlingve konata per sia mallongigo SUK 2012). La Foiiron organizis Urbo Karlovac, kaj la plenumorganizanto estis Asocio Carpe Diem. Krom la Urbo mem, la Foiiron finance subtenis pluraj firmaoj kaj institucioj.

La Foiro celas diskonigi la laboron de multnombraj civitanaj asocioj funkciantaj en la urbo, el kiuj al la ĉi-jara Foiro aliĝis sesdeko da ili. Publika prezento de ilia funkciado kaj varbado por siaj aktivecoj kaj membriĝo, celis ankaŭ al ekstera publiko montri la atingojn de civila socio en la urbo.

La ĉefa foira tago estis sabato, la 29-an de septembro, dum kiu ekde la 9h00 matene, en la ĉefa urba promenejo (Promenejo de d-ro Franjo Tuđman) lokiĝis multaj standoj. En la Foiro jam kutime partoprenas ankaŭ Esperanto-societo “Viktor Mihovilić” el Karlovac, kies prezidantino **Sanja Damjanić** deĵoris ĉe la stando.



En la hejmpaĝo de “Fondaĵo Ivo Lapenna” <http://www.ivolapenna.org/125.htm> troveblas novaldonitaj sondosieroj (elŝuteblaj) de/pri **Prof. D-ro Ivo Lapenna** okaze de la 125-jara datreveno de Esperanto. Bonvolu uzi kaj diskonigi ilin. Jen rektaj retligiloj al kelkaj el ili: **La adiaŭa parolo en Hamburgo 1974 (parto 1)**: <http://www.ivolapenna.org/2a.mp3> kaj **La adiaŭa parolo en Hamburgo 1974 (parto 2)**: <http://www.ivolapenna.org/2b.mp3>



 *Josip Pleadin*

KOREA PENTRISTO SONG HO SIN PREZENTAS

Ne malmulte mi surpriziĝis kiam komence de novembro mi ricevis retmesaĝon de **Song Ho**, korea esperantisto. Li skribis al mi, ke ni kune loĝis en junulara gastejo en Roterdamo dum la UK en 1988. Kaj jes, vere mi rememoris pri la skribinto.

Sed, des pli granda estis mia surprizo kiam li skribis, ke li estas korea artisto-pentristo kaj instruisto de Esperanto. Kiam mi vizitis lian retpaĝaron ĉe Ipernity, mi devis plurfoje reveni por ĝui liajn pentraĵojn.

Veraj artistoj inter esperantistoj estas raraĵo, kaj Song Ho estas ĝuste tia, senkonsidere ĉu temas pri olepentraĵoj, akvarelaĵoj, tuĉ- au krajonaj desegnaĵoj. Ankaŭ rilate la temojn li egale kvalite esprimas siajn artajn konojn pentrante portretojn, pejzaĝojn, nudpentraĵojn aŭ bestojn.

En plua korespondado mi petis la artiston skribi pli da detaloj pri si mem, kaj mi malkovris ankaŭ aliajn liajn kvalitojn, kiuj superas la averaĝon.

Li naskiĝis en Busan, Koreio, en la jaro 1953, kaj ĝis antaŭ nelonge li vivis en la ĉefurbo Seulo. Por la jaroj 2012-2013 li ŝanĝis loĝlandon, kaj vivas en Changzhou, Ĉinio, kie li estas instruisto de korea lingvo kaj Esperanto en Changzhou Liu Guojun Kolegio de Profesia kaj Teknika Studoj.

Kiel artisto, li estas membro de Korea Belarta Asocio. Inter esperantistoj li estis konata kiel eksvicprezidanto de Korea Esperanto-Asocio, kaj nuntempe li estas ĝia komitatano kaj membro de Lingva kaj Ekzamena komitato.

Li havis ĝis nun ses proprajn ekspoziciojn. La unua estis “Naturo kaj Homo” en Seulo kaj Busan en 2008, kiun sekvis “Korea Pejzaĝo” en la samaj

urboj en 2009, “Homaj Figuroj” en Seulo en 2009, “Marborda Pejzaĝo” en Seulo en 2011, “Lastatempaj Oleaj Pentraĵoj” en Kumamoto, Japanio, en 2011, kaj “Malsimilaj Mondoĵ” en Timisoaro kaj Braŝovo, Rumanio, en 2012.

En oktobro 2011 li estis tre engaĝita en la preparoj de la Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio.

Li estas ankaŭ konanto de pluraj lingvoj. Krom la korea, Esperanto kaj japana, li iom parolas ankaŭ la anglan, francan kaj ĉinan lingvojn.

Por la jaro 2013 li havas multajn planojn, sed unu el pli verŝajnaj estas lia alveno al Eŭropo, kaj restado en diversaj landoj. Ni klopodas interkonsenti kun li ankaŭ ekspoziciojn en Kroatio. Espereble ni povos prezenti lian arton ankaŭ al kroata publiko, unuavice al kroataj esperantistoj.



Ivica Šćepanović - Truto (naskiĝinta en 1965) estas en sia plej bona aĝo, kaj pro la naskiĝtagoj kiuj restis post li, kaj pro sia artista forto. Li vivas kiel izolita esperantisto en Humac sur la insulo Braĉ, en la medio sen aliaj esperantistoj, kio per si mem signifas ian formon de izoliteco.

Evidente li estas ŝatanto de naturo, aparte de sia hejma tero, ŝatanto de ŝtono kaj maro. Per sia profesio li estis dum jaroj ligita al ŝtono, laborinte en la ŝtonrompejo de "Jadrankamen" en la proksima Puĉišća. Dum resto de sia tempo li okupiĝas pri terkulturado, olivoj, produktado de vino kaj bredado de ŝafoj. Kioma kontrasto en tiu kamparana kaj laborista vivo kompare kun lia artista animo, kiu klopodas en sia objektivo "kapti" sunnaskiĝon, matenan kvieton sur marvastu, araneon en la matena ĉasado, malĝojon sur la vizaĝoj de siaj proksimuloj, roson en la araneaĵo.

Okaze de Zamehofa tago 2012 en la Popola biblioteko "Petar Preradović" en Bjelovar estos organizita lia fotoekspozicio, kaj ni uverturas ĝin per tiu ĉi prezento.



 *Josip Pleadin*

TRA LA OBJEKTIVO DE IVICA ŜĆEPANOVIĆ





La 27-an de septembro 2012 en Kutina estis refondita Esperanto-societo "La Espero". La refondan kunvenon, kiu okazis en la loka Kulturcentro, partoprenis 8 personoj. Akceptitaj estis la statuto kaj

la laborprogramo por 2013, kaj elektita la estraro. Por prezidanto de la societo estis elektita **Milan Perić**, por vicprezidanto **Mirjana Varat**, por sekretario **Nikolina Pejda-Starčić**, kaj la ceteraj membroj de la Administra komitato estas **Goran Lakotić** kaj **Krešimir Rastovac**.

La fondinto de la origina societo "La Espero", kies tradiciojn daŭrigos la aktuale refondita societo, estis **Milan Rastovac**, en la refonda kunveno honorigita per titolo de honora societano. La ĉeestitojn salutis **Nataša Dorosulić**, la prezidantino de Esperanto-societo "Sisak", kiu iniciatis la renovigon de la societo en Kutina. Ĉi-okaze ŝi transdonis al la novelektita prezidanto **Milan Perić** la monsubtenon de 500 kunaoj, por kovro de administraj kostoj pagendaj en la proceso de registrado. La kunvenon skribe salutis reprezentantoj de Kroata Esperanto-Ligo el Zagrebo, de Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac (kiu donacis al la societo lernolibron de Esperanto) kaj de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (kiu donacis al la societo 10 numerojn de sia gazeto "Zagreba esperantisto").

NOVAJ PAŜOJ EN KUTINA PER FONDO DE "LA ESPERO"

Redakcia kompilo

Bonan klimaton por Esperanto sukcese tenis ankaŭ la televida kanalo NET el Voloder, kiu en 2012 dufoje gastigis esperantistojn. La unuan elsendon la NET-televido elsendis en sia programo la 14-an kaj 16-an de januaro, kaj la duan la 2-an de majo 2012.

En la unua elsendo gastis **Srećko Radulović** el Esperanto-societo "Sisak" kaj **Josip Pleadin** el Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac, kaj gastigis ilin la ĵurnalistino **Josipa Peradenić**. En la dua elsendo ĉe la ĵurnalistino **Matea Miljan** gastis **Spomenka Štimatec** (la sekretario de Kroata Esperanto-Ligo), **Đivo Pulitika** el Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb kaj **Goran Lakotić**, la nuna membro de Esperanto-societo "La Espero" en Kutina.

Ambaŭ elsendojn per bonvolo de la NET-televido, la Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac ricevis por sia arkivo.



La refondon de Esperanto-societo "La Espero" anticipis informa prelego "Otkrijte međunarodni jezik esperanto" (Malkovru la Internacian Lingvon Esperanto), kiun iniciatis Esperanto-societo "Sisak", kaj kiun prezentis al kutinanoj **Josip Pleadin** el Đurđevac, la 2-an de majo 2012 en Popola universitato "Arcus".




RIJEKA



La 28-an de septembro 2012, antaŭ la memortabulo (ZEO) starigita en la ĉefa strato de Rijeka (ĉe la adreso Korzo 18), membroj de Esperanto-societo Rijeka solenis la 105-an datrevenon de la fondiĝo de "Adriatika Ligo Esperantista", la unua Esperanto-societo en Kroatio. Sur la foto farita de **Mario Zaccaria** staras de maldekste la societanoj **Vjekoslav Morankić**, **Luka Kik**, **Adela Franelić**, **Nataša Batistić** (aktuala societa prezidantino), **Boris Di Costanzo** kaj **Nikola Vuković**.

OSIJEK

Davor Klobuĉar, diplomita profesoro pri matematiko el Osijek, vicprezidanto de Kroata Esperanto-Ligo, prezentis sian libron "Matematika naŝa svagdaŝnja" (Matematiko nia ĉiutaga) dum la 35-a zagreb librofoiro "Interliber". La libroprezento okazis sabaton, la 17-an de novembro 2012 en la pavilono 6 de la Zagreba foiro. Temas pri 730-paĝa libro eldonita de



la zagreba eldonisto "Elemental", interesa kombinaĵo de la populara kaj serioza matematikoj. Unuamomente imagita kiel libro por mezlernejoj kiuj komencis interesiĝi pri matematiko, ĝi estas interesa ankaŭ al studentoj (de teknikaj fakultatoj kaj de matematiko mem), al instruistoj de matematiko en elementaj kaj mezlernejoj, inĝenieroj kaj hobiuloj.

VELIKA GORICA

Prof. d-ro sci. **Jozo Marević** el Velika Gorica, specialisto pri la latina leksikografio, gvidas grupon de fakuloj kiuj realigas la projekton de "Oklingva enciklopedia medicina vortaro". Krom la latina kiel la ĉefa lingvo, la vortaro enhavos difinojn en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala, krota kaj Esperanto. Ĉar la medicina terminologio estas plejparte grekdevena, en la vortaro oni okipiĝos ankaŭ pri la greka kaj latina etimologioj de unuopaj vortoj. S-ro Marević invitas esperantistojn, medicinajn fakulojn, aliĝi al la teamo de kunlaborantoj. Bezonatas fakuloj-kunlaborantoj pri medicina terminologio en unuopaj lingvoj, diverslingvaj redaktoroj kaj korektistoj. La vortaro ĝis nun inkluzivis komplete la literojn A-P, kaj parte aliajn literojn, respektive estas finfaritaj preskaŭ tri kvaronoj de la planita laboro. La vortaro enhavos minimume 25.000 lemojn. Se vi pretas kunlabori, bonvolu skribi al: jozo.marevic@zg.t-com.hr



DUGI RAT / OMIŠ

Duoble premiita estis konata esperantisto **Davor Grgat** el Dugi Rat, kiu pasintjare ricevis Personan premion de Komunumo Dugi Rat kaj la 16-an de majo 2012 transprenis ankaŭ Plakedon de Urbo Omiš, kiun al li solene transdonis la prezidanto dela urba konsilio, s-ro **Zvonko Miĉić**. En ambaŭ kazoj la premioj estis aljuĝitaj pro liaj ĵurnalistaj kaj esperantistaj aktivecoj.



LA JARO DE TIBOR SEKELJ

VERKISTA RENKONTIĜO EN HRAŠĆINA DEDIĈITA AL TIBOR

En la bieno de **Spomenka Štimec** en Hraščina, la 15-an de septembro okazis la dekan fojon Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj. La ĉi-jara temo estis "Cent jaroj de Tibor Sekelj (1912-2012)". La programo komenciĝis per la tradicia pikniko je la 13h00, post kio **Kaja Farszky** per sia muzika prezentado enkondukis la ĉeestintojn en la teman programon. Sekvis la projekciado de malnova televida filmo pri Tibor Sekelj. La heredaĵoj de Tibor en sia prelego prezentis lia edzino **Erzsébet Sekelj** el Szeged, kaj pri lia poezio parolis **Zlatoje Martinov** el Beogrado. La problemojn en la tradukado de la plej populara verko de Tibor "Kumeŭaŭa - la filo de la ĝangalo" en la francan parolis la tradukistino **Anne Jaucions**, kaj ĉapitrojn el la kroata traduko legis aktoro **Ivan Ožegović**. La libron "Songoj kaj ombroj" de **Zdravko Seleš** al la publiko rekomendis **Zlatoje Martinov**, kaj ekde la 18h00 koncertis **Neven Mrzlečki**.

La renkontiĝon partoprenis proksimume 50 personoj kaj la Kroata televido sendis specialan televidan skipon, kies raporto pri la aranĝo estis elsendita en la unua programo de la Kroata televido, enkadre de la matena programo "Dobro jutro Hrvatska" la 20-an de septembro.



 Redakcia kompilo



RONDA TABLO EN SUBOTICA

Ronda tablo "Vivo kaj verko de Tibor Sekelj" okazis inter la 18-a kaj 20-a de majo 2012 en Subotica, la urbo en kiu Tibor pasigis konsiderindan parton de sia vivo. Organizita de la tiea Esperanto-societo kiu nuntempe portas la nomon de Tibor, kaj sponsorita de la urbaj aŭtoritatoj, ĝi estis unu el multaj internaciskale organizitaj programoj en la jaro 2012, kiun Eŭropa Esperanto-Unio proklamis "La Jaro de Tibor Sekelj", kaj digna kontribuo de lokaj esperantistoj de Subotica al sia iama membro.

La Rondan Tablon ĉeforganizis **Đorđe Dragojlović**, kaj partoprenis pluraj personoj preleginte pri multfaceta vivo de internacie konata esperantisto, mondvojaganto, esploristo kaj verkisto. **Senad Čolić**





prelegis pri “Evoluo de agadstrategioj en la Esperanto-movado”, **Đorđe Dragojlović** pri “Komplete nekompleta vivografio de Tibor Sekelj” kaj “Kapabla por librotenisto”, **Dimitrije Janičić** pri “Tibor Sekelj, kunlaboranto de LA PROGRESO”, **Terezija Kapista** pri “En ombro”, **Zlatoje Martinov** pri “Universalismoj en la poemo de Tibor Sekelj *Mi vizitas mian farmon*”, **Boriša Milićević** pri “Interhomeco kaj internacieco de eminenta aganto”, **Josip Pleadin** pri “IOE-gazeto, la laŭtparolilo de IOE”, **Judita Rey Hudeček** pri “Tibor, la ĉiama semanto”, **Erzsébet Székely** pri “La lastaj aktivadoj”, **Ivan Špoljarec** pri “Tibor Sekelj kaj PIF”, **Viktorija Šimon Vuletić** pri “Laŭ spuroj de Kumeŭaŭa en neforgeso”, **Zlatko Tišljar** pri “La serĉata vivfilozofio de Tibor Sekelj”, **Vidosava Tomić** pri “Tibor Sekelj, neordinara mond-vojaĝanto”, **Ján Vajs** pri “Tibor Sekelj kaj Slovakio”, **Vera Zvarová** prezentis la tekston de **Magdalena Bekešová** pri “Tibor Sekelj en Subtatra muzeo”, dum siajn tekstojn sendis sed mem ne partoprenis **Detlev Blanke** (“Kelkaj rememoroj”), **Gian Carlo Fighiera** (“Sekelj, misiisto de Esperanto”), **Claude Gacond** (“Mondmapo, geografia terminologio”), **Arno Lagrange** (“Tibor en Vikipedio”), **Hugo Mora Poltronieri** (“Tibor en Kostariko”) kaj **Roberto Sartor** (“Tibor Sekelj, adoptita Argentinano”).

Pro neokazigo de la kvara sesio, ne okazis la prelegoj de **Đorđe Dragojlović** (“Tibor, redaktoro de VELO”) kaj filmo de **Stipan Milodanović** (“Laŭ vojoj de Tibor Sekelj”), kiu oficiale estis prezentita en Subotica la 23-an de septembro 2012.

Interpretis la prelegojn **Jovan Zarković** kaj **Radojica Petrović**.

La prelegantoj kolektiĝis jam jaŭde, la 17-an de majo, kaj havis komunan konsultiĝon dum la komuna vespermanĝo. Malfermo de la Ronda Tablo okazis vendredon, la 18-an de majo, en la urba “City Press Room”, kaj la honoron malfermi ĝin havis la tiama urbestro de Subotica, s-ro **Saša Vučinić**. En la malferma ceremonio **Lajčo Imrić** legis la mesaĝon de **Daniel Bernstein**, la filo de Tibor. Post la malfermo sekvis prelegsesioj, kaj estis aranĝita literatura vespero en la Festa salono de la Urba domo. Tiutage estis malfermita ankaŭ la ekspozicio “Centjaro de Tibor” en la ekspozicia salono de la Urba biblioteko. Sabate okazis vizito al la tombo de Tibor Sekelj en la subotica tombejo, metado de florkrono kaj ekspozicio “Pupoj” en la Uŝona angulo de la Urba biblioteko, organizita de **Ivan Špoljarec**. Dimanĉe la urbestro de Subotica solene inaŭguris la memortabulon sur la domo de Tibor Sekelj en la subotica korso.

Menciendas, ke la urba administracio subtenis la aranĝon per konsiderindaj financaj rimedoj, kaj per sia engaĝiĝo donis la merititan signifon al sia honorinda civitano.

ALIAJ PROGRAMOJ PRI TIBOR

Kvankam ni ne havas superrigardon pri ĉiuj programoj rilate “La Jaron de Tibor”, krom la jam menciitaj en aliaj artikoloj de ĉi tiu numero, ni faru aldonan liston de tiuj pri kies okazigo ni scias:

Spomenka Štimec prelegis en la 35-a Malferma tago de UEA la 26-an de novembro 2011, kaj ripetis tiujn prelegojn en Maribor (la 14-an de februaro 2012), en Vrbovec (la 17-an de majo) kaj Križevci (la 3-an de aŭgusto). Tibor Sekelj estis la temo ankaŭ de Meteorita festo en Hrašćina, okazinta la 26-an de majo.

La revuo “Globus” aperigis longan artikolon la 21-an de januaro kaj 30-an de marto. La 23-an de marto sesdeko da homoj solenis Tibor en ZgForum. Kroata televido filmis elsendon pri Tibor la 10-an de aprilo, **Judita Rey Hudeček** prelegis pri Tibor en la zagreba biblioteko “Bogdan Ogrizović” la 26-an de septembro.

Zlatko Tišljar prelegis pri Tibor en la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj la 22-an de majo, en Galivo dum la 9-a Eŭropa Esperanto-kongreso en julio, kaj en Banja Luka la 10-an de decembro.

Etnografia muzeo de Zagrebo preparas ekspozicion pri Tibor por la 19-a de decembro, per kio zagrebanoj festos Zamenhofan tagon.

Fondiĝis ankaŭ **Esperanto-soceto “Tibor Sekelj”** en Zagrebo, kies prezidantino estas **Mea Bombardelli** kaj sekretario **Darinka Sović**.

LA DEC-aj AKTIVECOJ

Redakcia kompilo



EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN KOPRIVNICA

Okaze de la 125-a datreveno de Esperanto, en la Biblioteko kaj legejo "Fran Galović" en Koprivnica estis starigita ekspozicio pri la Internacia Lingvo Esperanto. En la montrofenestroj, turnitaj al la ĉefa urba placo, inter la 21-a kaj 30-a de junio 2012 en kvar tutaĵoj estis prezentitaj kroataj Esperanto-lernolibroj ekde la komenco de la 20-a jarcento ĝis nun, tradukoj el la kroata beletra, libroj pri la historio de Esperanto kaj porinfana literaturo en Esperanto. Kiel aparta tutaĵo de la ekspozicio estis pendigitaj du paneloj titolitaj "Esperanto en Podravino", kiuj kronologie prezentas la plej gravajn eventojn el la Esperanta historio en ĉi tiu parto de Kroatio. La ekspozicion starigis, kunlabore kun Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac, la bibliotekaj dungitoj, kaj la tutan aranĝon aparte aprezis la direktorino **Dijana Sabolović-Krajina**, je kies interveno la VTV televida kanalo el Varaždin filmis la ekspozicion. Sekvo de tiu televida informo estis ankaŭ invito sendita al la sekretario de DEC **Josip Pleadin** por gastigi en la elsendo "Vekeřica", la 6-an de julio. La ekspozicio estis parto de la programo de la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj.



KONGRESAJ FILATELAĴOJ

Kunlabore kun la Filatelista societo de Koprivnica kaj helpo de ĝia funkciulo **Franjo Vinković**, la Organiza komitato de la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj eldonis specialan filatelan koverton ornamitan per la pentraĵo de pentristo **Radovan Grgec**. Kroata poŝto en sia oficejo en Koprivnica la 23-an de junio uzis ankaŭ speciala poŝtan stampon. Pri tiuj filatelaĵoj informis ankaŭ la oficiala retejo de Kroata poŝto: <http://www.posta.hr/default.aspx?id=1307&tvrsta=2&p=2476>, kaj la filatelista revuo "Glasnik Hrvatskog filatelističkog saveza" en sia numero 7-8, de la 29-a de julio 2012.



STARIGITA MEMORTABULO AL ILIJA PUHALO

Koprivnički Bregi estas vilaĝo troviĝanta proksime al Koprivnica, la ĉi-jara urbo-gastiganto de kroata nacia Esperanto-kongreso. En tiu vilaĝo vivis kaj laboris la konata fervojisto-esperantisto **Ilija Puhalo**, unu el la gvidantoj de Internacia Asocio de la Fervojistaj Esperantistoj (IAFE), kiu per liaj klopodoj havis sian sidejon en la tiama Jugoslavio. Okaze de la 75-a morto-datreveno de **Ilija Puhalo**, Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac proponis al Komunumo Koprivnički Bregi ke oni honorigu lin per starigo de dulingva memortabulo. La Komunumo akceptis la proponon, kaj okaze de la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj, la kongresanoj partoprenis la inaŭguran solenaĵon de nova ZEO, kiu staras sur la Socia domo en la vilaĝo, fakte sur la konstruaĵo kie funkciis la loka Esperanto-klubo antaŭ la dua mondmilito.

Ĉiujn kostojn de la tabulo kaj la festo pagis la Komunumo Koprivnički Bregi, kaj la tabulon la 23-an de junio 2012 kune malkovris **Darko Sobota** (prezidanto de la komunuma konsilantaro) kaj **Josip Pleadin** (sekretario de Dokumenta Esperanto-Centro), simbole deprenante la Esperantan flagon per kiu la tabulo estis kovrita.

Esperanton kiel gravan fenomenon en la historio de la vilaĝo Koprivnički Bregi mencias kroatingve ankaŭ la retejo de la Komunumo: <http://www.koprivnicki-bregi.hr/povijest.aspx>

Pli detale pri **Ilija Puhalo** kaj Esperanto en la regiono vi povas legi ĉe: <http://www.ipernity.com/blog/213107/351718> kaj la detala artikolo pri la regiona Esperanto-historio aperis en la Kongresa libro de la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj, kiun vi povas elŝuti ĉe: <http://www.ipernity.com/doc/213107/12879040> aŭ mendi ĝian elektronikan kaj paperan versiojn ĉe: dec.kroatio@gmail.com

NEVEN MRZLEČKI KANTAS POR VI

Kiel kromprodukton de la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj, Dokumenta Esperanto-Centro eldonis lundiskon kun komplete filmita koncerto de **Neven Mrzlečki**, okazinta la 23-an de junio 2012.

Neven estas ofta gastulo de Esperantaj aranĝoj, sed ĝis nun malofte oni registris liajn koncertojn. Jen unu el tiaj registraĵoj por via ĉiutaga hejma ĝuado aŭ por prezentado al viaj kursanoj aŭ societanoj!

La repertuaro de la koncerto estas parte jam konata, sed grandparte tute nova, preparita por la 10-a kongreso kaj unuafoje prezentita en Koprivnica.

Prezo: 70,00 kunaĵoj / 9,60 eŭroj

Mendu ĉe: dec.kroatio@gmail.com



ANKORAŬ HAVEBLAS

Ĉe Dokumenta Esperanto-Centro ankoraŭ haveblas komunaj kongresaj fotoj de la 10-a kongreso (20,00 kunaĵoj), kongresa filmo (70,00 kunaĵoj) kaj disko kun kongresaj fotoj (50,00 kunaĵoj). Ĉiuj prezoj inkluzivas la sendokostojn.

Mendu ĉe:
dec.kroatio@gmail.com

DIVERSAJ AKTIVECOJ EN SISAK

 Srećko Radulović

Por Esperanto-societo "Sisak" la jaro 2012 estis plena da eventoj. Mi provos skizi kronologie kelkajn el la plej gravaj.

Komence de 2012 nia societo havis 14 membrojn.

En januaro ni organizis rapidan kurson de Esperanto, kiun de la 9-a ĝis la 15-a de januaro gvidis **Josip Pleadin** el Đurđevac, kaj frekventis ĝin **Ivan Milutinović, Ivan Redep, Jadranka Kljajić** kaj **Srećko Radulović**, kiuj faris ekzamenon la 15-an de januaro. La prezidantino de la ekzamena komisiono estis **Marija Jerković** el UPE. La kurson anoncis la gazeto "Novi sisački tjednik" (en sia numero de la 5-a de januaro), kaj specialan raporton filmis NTV (Nezavisna televizija el Voloder), kun sia raportistino **Gordana Medur**.



La kurso rezultis ankaŭ per alia duonhora elsendo de NET-televido filmita en la studio en Voloder la 13-an de januaro, en kiu gastis **Srećko Radulović** kaj kursvidanto **Josip Pleadin**.

"Novi sisački tjednik" en la numero de la 20-a de januaro publikigis la artikolon "Sisačke lutke u dalekom Japanu".

La 25-an de februaro la societo okazigis sian elektan jarkunvenon en "Kristalna kocka vedrine". Por la nova prezidantino estis elektita **Nataša Dorosulić**, kiel vicprezidanto elektigis **Srećko Radulović**, kaj kiel membroj de la estraro **Ivica Buturac, Bernard Ĉulibrk, Ivan Radulović** kaj **Ivan Redep**. Membroj de la Kontrola komisiono estas **Jadranka Kljajić, Zlatko Boroš** kaj **Dejan Kolarik**. Dum la jarkunveno,



interalie, estis traktitaj du gravaj temoj: 1) propono pri eksterorda jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo kaj 2) ŝanĝoj de la statuto de KEL.

Post la jarkunveno, ni enketis ĉiujn kroatajn Esperanto-societojn pri pluraj temoj, kun la jena rezulto: la societoj subtenis la ideojn organizi la 11-an kongreson en Sisak kaj Petrinja, la planitajn kunvenojn de societaj reprezentantoj, okazigon de eksterorda elekta jarkunveno de KEL kaj ŝanĝadon de la Statuto de KEL.

La nova prezidantino **Nataša Dorosulić** formis la 24-an de januaro profilon de nia societo en Facebook.

Inter la 22-a kaj 24-a de junio niaj 5 membroj partoprenis la 10-an kongreson de kroataj esperantistoj en Koprivnica, kaj tie la prezidantino **Nataša Dorosulić** oficiale invitis la 11-an kongreson al Sisak kaj Petrinja. La 8-an de septembro estis sendita la oficiala kandidatiĝo al Kroata Esperanto-Ligo, sed pro nericevo de la subteno al tiu aranĝo flanke de urbaj kaj departementaj instancoj, ni devis retiri la kandidatiĝon.

La 10-an de julio **Srećko Radulović** partoprenis la unuan kunvenon de reprezentantoj de Esperanto-societoj de Kroatio en Bjelovar.

Kunlabore kun Dokumenta Esperanto-Centro, Bjelovara Esperantista Societo kaj Esperanto-societo "Petrinja" ni estis kunorganizantoj de la prelegoj "Brazilo - koninda lando" de la brazila esperantista paro **Menegasso**, la 27-an de junio en Sisak kaj Petrinja.

De la 31-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto, kune kun la Esperanto-societoj "Viktor Mihovilić" el Karlovac, "Mondo paca" el Velika Gorica kaj "Petrinja" el Petrinja, ni organizis la 4-an boatadon sur la rivero Kupa.

La 26-an de septembro estis fondita



Esperanto-societo "La Espero" en Kutina, kiun ni iniciatis, kaj ni donacis simbolan monsumon por ĝia registriĝo.

Nia reprezentanto partoprenis ankaŭ en la preparkunveno de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj organizita en Ekonomia Ĉambro en Zagrebo la 9-an de

oktobro.

La 15-an de oktobro 2 niaj membroj partoprenis en la verkista renkontiĝo en Hraščina.

Sreĉko Radulović estas elektita membro de Statuta komisiono de Kroata Esperanto-Ligo, kaj aktive partoprenas ĝian laboron.



NEKUTIMAJ PASIOJ DE DUŠAN ADNADJ

Josip Pleadin

Okaze de lia 70-a naskiĝtago en 2011, pri **Dušan Adnadj** el Borovo grandan intereson montris amasinformiloj en Kroatio kaj Serbio. Fakte ne li mem elvokis tiun intereson, sed la nekutimaj hobiaj pri kiuj li okupiĝas. Jam 55 jarojn li kolektas fotojn de filmaktoroj, kaj okupiĝas pri la Internacia Lingvo Esperanto. Esperantistoj el Kroatio kaj eksjugoslavaj landoj bone konas lin, kvankam el la aktiva esperantista vivo li retiriĝis en 1989. Li estis la ĉefa motoro de Esperanto-societo "Fratoj Ribar" en Borovo, kaj la "bona animo" de la Esperantlingvaj revuoj "Voĉo" kaj "Voĉo de handikapuloj". Pri lia historia rolo en la Esperanto-movado ni ne devas aparte skribi. Ni nur nombru la artikolojn kaj elsendojn, kiuj en la pasintaj du jaroj prezentis lin al la ĝenerala (neesperantista) publiko. Jen la (eble nekompleta) listo:

- Serblingva gazeto "Izvor" (Vukovar) en la numero 35 (novembro 2011) publikigis la

tekston "Zamrznute pokretne slike" (Glaciigitaj moviĝantaj bildoj) kaj en la numero 46 la dupaĝan artikolon "Jezik čije ime znači nada" (La lingvo kies nomo signifas *espero*), verkitajn de ĵurnalisto **Slavko Bubalo**.

- Sendependa serba semajna gazeto "Novosti" (Zagreb) en la numero 636 (februaro 2012) publikigis la dupaĝan artikolon "Kako je Holivud stiĝao u Borovo" (Kiel Hollywood atingis Borovon), verkitan de ĵurnalisto **Dragana Bošnjak**.

- Porinfana gazeto "Bijela pĉela" (Blanka abelo) el Rijeka publikigis la artikolon de S. B. "Unuci vole Džeki Čena" (La nepoj satas Jackie Chan-on).

- Radio-stacio Borovo elsendis la 25-an de februaro 2012 la 29-minutan elsendon titolitan "Kolekcionar Dušan Adnadj" (Kolektanto Dušan Adnadj) de la ĵurnalistino **Dragana Bošnjak**.

- Radio-televido de Vojvodino elsendis la 31-an de novembro 2011 la elsendon "Zamrznute pokrente slike" (Glaciigitaj moviĝantaj bildoj), aŭtoritan de **Slavko Bubalo**.

- Kroata radiotelevido raportis pri Dušan Adnadj en la elsendo "Hollywood u Borovu" (Hollywood en Borov) la 15-an

de marto 2012 (ĵurnalistino **Stela Sep**).

- Radio-televido de Vojvodino elsendis pri "Esperanto je bio deo mog života" (Esperanto estis parto de mia vivo) la 25-an de julio 2012 (ĵurnalisto **Slavko Bubalo**). Tiun elsendon transprenis kaj satelite elsendis ankaŭ Radio-televido de Serbio.

En ĉiu el tiuj kontribuajoj, almenaŭ preterpase, sed en kelkaj el ili ankaŭ kiel ĉefa temo, estas menciita Esperanto en tre pozitiva senco, sed pri tiu hobiaj de nia ĉefrolulo ni jam sufiĉe multe scias. Surpriza malkovro por ni, esperantistoj, estas lia kolekto de fotoj de tutmonde konataj filmaktoroj. La kolektanto mem taksas, ke lia kolekto konsistas el ĉirkaŭ 3000 fotoj, sed li daŭre kolektas ilin. Grandparte ili estas aŭtografitaj de multaj famaj nomoj de filma industrio, kiuj nuntempe jam ne plu vivas. Pro tio la kolekto estas vere valora raraĵo, verŝajne la plej granda tia kolekto en Kroatio, kaj supozeble unu el raraj ankaŭ pli vaste. Kvankam li komencis kolekti la fotojn en 1955, eĉ nuntempe ili preskaŭ regule venas al lia adreso.

Malgraŭ la multjara okupiĝo pri tiu nekutima hobiaj, eĉ multaj liaj plej proksimaj amikoj ne konis lian pasion.



Adriatika Feriado 2013

La loko:

Prvić estas malgranda insulo en la arkipelago de la urbo **Šibenik** en **Dalmatio**. Sur la insulo ekzistas nur du tipe fiŝistaj vilaĝoj: **Prvić Luka** ka **Šepurine**. La insulo okupas la areon de nur 2,41 kvadrataj kilometroj, kaj sur ĝi vivas ĉirkaŭ 500 loĝantoj. Sur la insulo pasigis la infanaĝon **Faust Vrančić**, la inventinto de paraŝuto, kaj en unu el la insulaj preĝejoj troviĝas lia tombo. Sur la insulo estas malpermesita aŭtomobila trafiko, pro kio ĝi estas trankvila oazo por ripozo, ankoraŭ neplagita per amasa turismo, sed tamen troviĝanta proksime al tri naciaj parkoj (**Kornati**, **Krka**, **Paklenica**) kaj nur je duonhora ŝipveturado de konataj turismaj urboj.

La feriejo:

La Hostelo "Peski" www.facebook.com/prvic.luka.3 en **Prvić Luka**, kun 40 litoj en kvarlitaj ĉambroj. Ĉiu ĉambro havas duŝejon kaj necesejon. La Hostelo posedas proprajn restoracion, la terason tuj ĉe la maro, kaj la ŝtonan plaĝon. Se vi bezonas plian komforton, ĉe la organizanto petu informojn pri hotelo aŭ privataj apartementoj.

La prezo:

2.100,00 kunaoj (280,00 eŭroj) por la tuta semajno. La prezo inkluzivas: 7-tagan loĝadon en la Hostelo "Peski" en kvarlitaj ĉambroj (etaĝlitoj), po tri manĝojn tage en la hostela restoracio, turisman imposton, busan transporton de Zagrebo al Šibenik kaj reen, ŝipan transporton de Šibenik al Prvić kaj reen, Esperantajn programojn, informmaterialojn kaj organizajn kostojn. Por aliĝintoj kun propra transporto la aranĝo kostas 1.800,00 kunaojn (240,00 eŭrojn). La prezo ne inkluzivas: asekuron kaj ekskursojn, kiuj okazos se aliĝos minimume 30 personoj por ĉiu planita ekskurso.



La aranĝo:

Adriatika feriado estas feria kaj turisma aranĝo kun Esperantaj programoj. Dum 7 tagoj vi povos senĝene ĝui la varman sudan maron en malgranda insulo. La Hostelo troviĝas en ombro de arboj, kaj la manĝejo en la teretaĝo de la konstruaĵo. Dum posttagmezoj kaj vesperoj ni organizos Esperantajn programojn, kaj estas planataj du duontagaj/tuttagaj ekskursoj al la proksimaj Naciaj parkoj Kornati (prezo: 450,00 kunaoj/60 eŭroj) kaj Krka (prezo: 375,00 kunaoj/50 eŭroj). Se ekzistos intereso, revene al Zagrebo, ni haltos ankaŭ en la tria Nacia parko, Lagoj de Plitvice (prezo de enirbiletoj: 110,00 kunaoj/15,00 eŭroj).

Aliĝoj validas nur post garantia pago de 750,00 kunaoj (100,00 eŭroj). En kazo de posta rezigno, la garantia pago ne estas repagebla, sed estas uzebla flanke de alia persono, interkonsente kun la organizanto.

Pliaj informoj kaj aliĝoj ĉe la organizanto:

DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO
Bana Jelačića 138A, HR-48350 Đurđevac, Kroatio
dec.kroatio@gmail.com





MALLONGE PRI MIA LANDO KUBO

Boris Arrate Veranes

Kubo (Kuba Respubliko) estas mezamerika insula lando situanta en Kariba Maro kaj la plej granda insulo de Antiloj, kiu okupas 110.860 kvadratajn kilometrojn da areo. Ĝin ĉirkaŭas 4.195 insuletoj, el kiuj pli grandas Junulara Insulo. La klimato de Kubo estas tropika (vintre 22 ĝis 30 gradoj; somere pli ol 50 gradoj). La plej agrabla sezono en Kubo daŭras estas de novembro ĝis februaro. Kubo konsistas el 15 provincoj kaj 169 municipoj kaj ĝia ĉefurbo estas Havano, fondita en 1519, kaj en 1982 proklamita de Unesko "kultura heredaĵo de la homaro". La lingvo parolata en Kubo estas la hispana.

La nomo de Kubo devenas de la indiana vorto "ciba" kiu ĉe la tainoj signifis "ŝtono, monto, kverno".

Kubon malkovrita la 27-an de oktobro 1492 Kristoforo Kolumbo, kiu diris: "JEN LA PLEJ BELA TERO KIUN HOMAJ OKULOJ IAM VIDIS". Tiam okazis renkontiĝo inter du civilizoj, malsamaj ekonomie, socie kaj kulture kaj komenciĝis ekspluatado de la indiĝenaj etnoj, kaj rabado de la trezoraĵoj de la malkovrita lando. La hispana konkero rezultigis pereigon de indiĝena loĝantaro. Tial hispanoj loĝigis en Kubo afrikajn sklavojn por labori kaj kultivi la grundon. En 1797 Kubo fariĝis lando de sklaveco kaj sklavkomerco. Ekde 1868 komenciĝis lukto por la kuba sendependiĝo kaj en 1898 hispanoj estis forpelitaj. En 1902 la ŝtato inaŭguriĝis kiel Kuba Respubliko. Ĝis 1959 Kubo estis okupita de la usonanoj, kontraŭ kiuj ekbatalis grupo de kubaj revoluciuloj gviditaj de la Komandanto Fidel Castro Rúz, prezidento de Kuba Respubliko ĝis 2006.

La kuba kulturo enhavas intermiksitaĵn elementojn devenantajn el aliaj landoj de Eŭropo (Hispanio), Afriko (dum la sklava periodo), de najbaraj landoj kaj de la indiĝenaj praloĝantoj tainoj kaj cibonenoj. Kubo estas nomata lando de la centra kaj regiona kariba kulturoj, kaj ĉiujare okazas la Kariba festivalo en la orienta urbo Santiago de Kubo

Kubo, la insulo ĉirkaŭita de maro, najbaras norde kun Usono kaj Bahamio, sude kun Jamajko, Kajmana insularo kaj Kariba maro, okcidento kun Meksikio kaj oriente kun Haitio. Kubo koncentriĝis al eksporto de tabako, sukerkano kaj fruktoj, sed ĉiam pli grava fariĝas ankaŭ turismo.



LA DANĜERA HOMO

 Radenko Milošević

Pasis kaj pasas, kaj pasos konstante la jaroj ekde kiam mi ensaltis ĉi tiun "Esperanto-boaton". En la komenco mi vidis kaj la "boaton" kaj la lingvon, do nian boat-Esperantujon en lumo de la ĉiama trankvileco kaj kalmu. Foliument diversajn librojn en kaj pri Esperanto mi malkovardis interhomajn laŭdojn kaj ofendojn. En la komenco estis iaspeca laŭdo en la Akademio pri artoj kaj sciencoj en Zagrebo, en decembro 1891. Poste mi legadis pri persekutoj kontraŭ Esperanto, pri atakoj kontraŭ ĝi dum epokoj de diktatoraj kaj hommalamaj reĝimoj. Kaj jen, finfine, mi trovis la tre interesan libron "La danĝera lingvo" de Ulrich Lins.

Mi ekkomprenis la ĝis nun nekomprenitajn aferojn, kaj mi malkovris parabolon en la kroacia Esperantujo. Inter ni kaŝe kaj maskite, sed ĉiam pli laŭte laboras "la danĝera homo"! Kiu li estas? Ĉu li estas homa estaĵo? Ĉu li entute estas iu aŭ io?

Ja, sendube danĝera homo!

Li verkas kaj redaktas la proprajn kaj alies librojn, dezajnas, redaktas, lingve kontrolas kaj provlegas gazetartikolojn, organizas kaj helpas organizi kongresojn, kunlaboras en diversaj societoj esperantistaj. Li organizas arkivon, kolektas malnovajn kaj pratempajn aktojn, dokumentojn kaj fotojn esperantistajn. Arkeologe li dignas, serĉas kaj kompilas biografiojn kaj historiaĵojn, kiuj sen lia sindonemo pereus, kaj per ilia pereo forgesiĝus ankaŭ la iam vivintaj samideanoj. Multaj planis fari tion, sed li faras!

Ja, treege danĝera homo!

Nekredeble! Li intencas scii pri kostoj, entreprenitaj agoj



kaj enspezitaj/elspezitaj financoj. Nepripenseble! Kial li zorgas pri tio? Suspektinda ago de la danĝerulo! Li uzurpas la terenon de aliaj! Tabuajn temojn oni ne publikigu! Oni ne faru ondojn sur trankvila maro!

Li deziras en niaj lokaj societoj kaj en la tegmenta Esperanto-asocio al la membraro konigi la elspezojn, diskonigi la funkciadon! "Klarajn" kaj asocie kaŝindajn laborojn li volas nudigi antaŭ la membraro!

Ja, zorgoplene danĝera homo!

Ekskomuniki oni klopodis lin el nia eta Esperantujero nacinivela. Oni diskonigis kontraŭ li diversajn mensogojn, riproĉojn, primokojn, sed homojn oni ne rajtas subtaksi, ili ja estas homoj prudentaj. Sed diable, oni povas lin nek forviŝi nek forblovi el la

kroacia kaj la monda Esperantujo. Li estas ornamita per laŭgirlingando de enlandaj kaj eksterlandaj laborsukcesoj, premioj, honorigoj! Oni ne povas lian radikaron tutsimple elfosi.

Ja, certe danĝera homo!

La pinto de ofendoj kontraŭ li estis legebla en la artikolo en iu internacia Esperanto-magazino. Tie li estis "ordenita" per la titolo "limako fiaskulo"! Kiel sciante, li havas propran domon, do li ne estas limako sen propra tegmento. Jes li preskaŭ fiaskis! Lian preskaŭ-fiaskon oni povas trovi en la popola proverbo: "Helpu povulon, je propra honto!" Klopodinta esti fulmo, la sago mistrafis, kaj malkovris animan kaj spiritan nudecon de la sagopafinto.

Eble iuj danĝera homo!

Eble iuj trovos, ke mia sekva metaforo estas tro nereala. Pripensu ni! Mi komparus "la danĝeran homon" kun la Vitruvia homo de la fama Leonardo da Vinci! Kion komunan havas la danĝerulo kun la fama homo de Leonardo? Kion? Jen! La fama desegnaĵo baziĝas je korelacio inter la idealaj homaj proporcioj. En la prezentita teorio pri "bone proporciita homo", la kerna ideo estas ideala interrilato de la korpopartoj. Kaj jen la paralelo: "la danĝera homo" el nia rakonto zorgas pri idealaj kaj ofte idealigitaj interrilatoj de Esperanto-homoj, atendante "bone proporciitan homan interrilaton"!

Ja, sendube - la danĝera homo!

Levetu ni iomete parteton de la vualo de tiu ĉi enigmo, menciante ke temas pri "la danĝera homo" aganta ene de la "danĝera lingvo"! Do, mi invitas vin diveni pri kiu temas?

Popolkanto romaa

NUN NE ESTAS KIEL IAM ESTIS
(Naj akana sar kaj sas)

*Nun ne estas kiel iam estis:
dum ni vagis en kafejoj,
dum ni trinkis ruĝan vinon,
dum ni kisis belulinojn.*

*Nun ne estas kiel iam estis:
dum aŭror' ni leviĝadis,
en vilaĝoj aŭguradis
kaj monhavaj gaje festis.*

Nun ne estas kiel iam estis.

Esperantigis: Ivo Borovečki

ODO AL NIA PANJO

*Hodiaŭ kiam Vi
kun ni ne plu estas,
mi mem monologas
serĉante respondojn
al demandabundo.*

*De kie al Vi
la forteco supernatura
por pasigi sennombrajn,
sensongajn noktojn
kaj frumatene ellitiĝi
ankoraŭ pli forta:
KIE, KIEN kaj KIEL ekiri
kun infanoj etaj?*

*De kie al Vi la forteco ega,
por el nenio miraklojn fari
kaj al karuloj multnombraj
pli bonan vivon donaci?*

*Hodiaŭ mi scias
ke Viaj atingoj
superhomaj
estis grandegaj rezignadoj*

Emilija Katić-Obradović

ALMOZO POR VIVI

*Ne timu kara mia.
Tra la tuta nokto
amo neniam ripete
estas la sama.
Ekzistas antaŭo
kaj posto de la amo.
La amo estas senfina
renaskiĝo.
La amo estas blua koloro,
neeldirita vorto,
espero post la morto,
printempo en aŭtuno
por rifuĝi en komunan
momenton kaj atendi
kiam la memoroj realas
aŭ ŝajnas esti tiaj.
La amo estas postulo pri la
eterno.*

Milica Ježovita

MIHAELA CIK



Ŝi estas juna esperantistino el Đurdevac naskiĝinta en la jaro 1994. Ŝi lernis Esperanton en la kurso gvidita de profesoro **Zdravko Seleš**, en la Gimnazio “Ivan Kranjčev” en Đurdevac. Ŝi ekŝatis Esepranton pro tio, ĉar ŝia patrino dum sia juneco estis esperantistino.

En septembro 2012 ŝi fariĝis studentino de kompara literaturo en la Filozofia fakultato de Zagrebo.

Ŝi estas membrino de Dokumenta Esperanto-Centro en Đurdevac, vizitas renkontiĝojn de Esperantlingvaj verkistoj en Hraščina, kaj partoprenis la 9-an kaj 10-an kongresojn de Esperanto. En tiu ĉi lasta, ŝi eĉ kunlaboris en la Organizakomitato.

“Zagreba Esperantisto” jam kelkfoje publikigis ŝiajn originalajn verkojn en Esperanto. Ŝia pritrakto de la verko “La vivo de Damoru” rezultis per publikigo de ĉapitro el ŝia teksto sur la kovrilpaĝo de la Esperanta eldono, kaj per publika laŭdo dum la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar.



SERĈO

*Pensu pri mi! Ne nur iam -
Ĉiutage.
En amo modesteco ne estas virto.*

Tion kion vi serĉas, ĉi tie vi trovos.

*Salu teran manaon per miaj larmoj!
Maltigu morteman nektaron per mia
spiro!
Vi estas homo -
Mi ŝanĝis vin al dio!*

*Ripetu tiujn vortojn kial mantron:
Tion kion mi serĉas, ĉi tie mi trovos.*

*Trovu min en la koloro de akvo
Kaj en la gusto de aero!
Mi ne kaŝis min -
Ĉieĉeesto estas mia povo.*

Tion kion mi serĉas, ĉi tie ni trovos.

GLORIA MUNDI

Al Slava Raŝkaj

*“Mi parolas al vi per movo.
Mi eksplikas al vi per koloroj.
Mi sentas vin per tuŝo.
Vi povas trovi min en turniĝo de silento.”*

Ĉu vi jam ekkonis ŝin?

*Mi scias, ŝi estas fore.
Vin vokas belaj promesoj.
Vin katenas viaj devoj.*

*Vi scias, la tempo pasas senkompate.
Vi devas trovi ŝin ĉar
Ŝia mondo estas via hejmo.*

Sed la atendo forportas ĉion...

*Silenton disŝiris suferula krio.
Nur la nimfeoj aŭdis ĝin.*





Karaj amikoj, kun entuziasmo kaj ĝojego mi trovas tiun okazon por saluti vin. Permesu al mi prezenti min. Mi estas Honoré, edziĝinta loĝanto de orienta provinco Kivu en Demokratia Respubliko Kongo. Mia edzino Anita estas 27-jaraĝa kudromaŝinistino en laborejo. Ni estas ĝojegaj korespondi kun vi. Ni pretas interŝanĝadi poŝtmarkojn, fotojn... Mi mem nun estas senlabora, sed antaŭe mi laboris en ŝtatoŝeficejo de minadoj kaj geologio. Bedaŭrinde, nia konga registaro neniam zorgis pri ni. Ĝi ne volis konatiĝi kun novuloj en ŝtata servo. Ĝi ne volas pagi laborantojn. Tiuj kiuj gajnas estas ministroj, prezidento, naciaj deputitoj, medicinaj doktoroj... Mi intencas kunlabori kun vi por ke ni kreu fortan amikecon internacian. Dank' al Esperanto ni povas krei internacian amikecon kaj familian rondon. Mi esperantistiĝis en 2004 kiam mi finstudis tutan programon de Esperanto-kurso kaj fine akiris Esperanto-diplomon. Ekde 2005 ĝis nun mi estas individua membro de UEA. Ekde 2009 mi estas prezidanto de Verda Stelano Klubo (VSK) en nia teritorio Rutshuru. Mi intencas krei Esperanto-centron en orienta provinco Kivu, precize en Rutshuru. Mi esperas ke post la milito en Kivu aperos tia ebleco. En tiu Esperanto-centro realiĝos diversaj projektoj (hotelo, lernejo, gastejo, publika sekretario). Mi interesiĝas pri la naturo, promenado, familio, legado pri nia lingvo internacia Esperanto; muziko, fiziko. Mi volas scii pri via vivo, laboro, moroj, lando ktp. Mi ofte sendas leterojn el alia lando - Ugando, ĉar en nia loko ne plu ekzistas poŝtoŝeficejo.

Frate via

Honoré Sebuhoza
Eglise Cebce Remera.
PO BOX 08
Bunagana-Kisoro
UGANDO
Rete: honsebn@yahoo.fr



Mi volus korespondi kun gesamideanoj el Kroatio. Mi estas togolanda esperantisto Woudji Kossi, vivanta en Senegal. Mi estas 32-jaraĝa instruisto de la franca lingvo kaj Esperanto. Mi scipovas kudri vestaĵojn. Tion mi delonge lernis. Mi deziras korespondi kun gesamideanoj en aĝo inter 18 kaj 65 jaroj. Mi ŝatas kiam oni vizitas min. Se iu deziras veni por fari iajn aferojn, komercon, investadon, se li deziras krei fabrikan, ankaŭ pri tio mi interesiĝas. Bonvenas ankaŭ lernantoj, dezirantaj pasigi libertempon en Afriko. Mi tutkore akceptas ĉiujn kaj ofertas senpagan gastigadon.

Mia retroŝta adreso estas:
swoudji55@yahoo.fr

Tutkoran saluton! Mi volas amike korespondi. Mi serĉas kontaktojn. Mi estas Julia, 63-jara esperantistino loĝanta en bela ukraina urbo Lviv. Ellerninte Esperanton en la jaro 1978, mi korespondas tutmonde. Kvankam mi havas multe da diversajn interesojn, tamen la ĉefa estas - nia vivo. Hodiaŭ multaj homoj ĝenerale estas feliĉaj, sed sur ilia vivovojo aperas nemalmultaj problemoj. Ni iĝas des pli aĝaj, ju pli multe ni komprenas, ke nia vivo estas mallonga. Nia Kreanto, la Plejpotenca Dio, deziris por ĉiuj homoj, ke ili vivu eterne pace kaj feliĉe sur la paradiza tero. La Sankta Biblio skribas: "Kaj la

humiluloj heredos la teron, kaj ĝuos grandan pacon. La virtuloj heredos la teron kaj loĝos sur ĝi eterne" (Psalmaro 37, versoj 11,29); "Kaj la Dio forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj; kaj morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis" (Apokalipso, ĉapitro 21 verso 4) - traduko de d-ro Zamenhof.

Al mi tre plaĉos ricevi leterojn. Bonfarton al vi.

Retpoŝta adreso de Julia estas: **esperokarmen@gmail.com**

Mi estas 76-jaraĝa Ruso, eksa kuracisto kun sana menso kaj arda deziro okupiĝi pri filatelo. Mia amata ĉevaleto estas francaj nestampitaj poŝtmarkoj. Interŝanĝe mi proponas sovetajn poŝtmarkojn, dezirinde laŭ katalogo Yvert&Tellier (Francio). Mi proponas eventualan interŝanĝon per kovertoj de ordinara poŝto. Mi kun dankemo akceptos ajnan proponon rete korespondi. Mi povos esti utila al komencantoj por pliperfektigi nivelon de Esperanto. Certe, mi volonte skribos ankaŭ ruslingve, se mia eventuala korespondanto regas la rusan. Mi loĝas en respubliko Marij El, kies ĉefurbo estas Joŝkar-Olo (Ruĝa Urbo - mari-lingve).

Dankon pro Via klopodo helpi akiri por mi korespondant(in)on. Amike, Jurij Kivaev.

Mia retroŝta adreso estas:
jurijkivaev@yandex.ru





Koprivnica
22 - 24. 06. 2012.
DESETI KONGRES HRVATSKIH ESPERANTISTA
DEKA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ